Driemaandelijks tijdschrift — Afgiftekantoor: Antwerpen X
Jarkolekto 25 - trimonata

1/95

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

Organo de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj ILEI

Redaktisto: József NÉMETH
Vicredaktisto: Katalin SMIDÉLIUSZ

Kunredaktintoj de la aktuala numero:
Ervin FENYVESI, Stefan MacGILL,
Franz-Georg RÖSSLER

Respondeca eldonanto (verantw. uitgever): E. Symoens, Putsesteenweg 151, B-2920 Kalmthout

IPR

Redaktejo: Németh József
H-8500 Pápa, Kilián ltp. 75/9
Tel.: + 36-89-315-836 (hejma kun respondaparato)

Presado: Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140,
B-2000 Antwerpen, ☎ +32-3-234 34 00

ENHAVO

GOLDEN, Bernard: *Komplika transitiveco en Esperanto* 1
BARANDOVSKÁ, Vera: *Lernolibro pri interlingvistiko* 12
KURUCZ, Géza: *Konkursoj kiujn aprobis la praktiko* 16
SMIDÉLIUSZ, Katalin: *Nova vidbend-serio de IEI* 19
MALACION, Aleksandr: *Devigan instruadon aŭ realan vojon* 20
El la sekcioj kaj landoj 22
NÉMETH, József: *La 10aj Esperantaj Pedagogiaj Tagoj* 27
Internaciaj kontaktoj (Intervjuo, Grésillon, Infanaj Rajtoj) 30
Por via notlibro (E-familioj, eldonaĵoj, komputila E-programo) 34
Postparolo de la nova redaktoro 36

ILEI bedaŭris ricevi demisipeton de nia redaktoro de IPR. La vicredaktoro ne povis transpreni tiun taskon, kaj kiel komisiito de ILEI pri eldonado, serĉis kaj trovis novan redaktoron. La estraro de ILEI en aprilo '95 akceptis tiun proponon, sekve vi havas numeron 95/1 en viaj manoj, redaktita de sinjoro *Németh József* el *Pápa* (Hungario). Lian foton vi trovos sur paĝo 36, kaj biografion en numero 94/4, kiu nur poste aperos. Ĝin pretigas la siatempa vicredaktoro kun ĉeftemo *instruiloj* kaj ĝi enhavas adiaŭan mesaĝon de la antaŭa redakcio. *smg*

ESTRARO DE LA LIGO

Prezidanto: d-ro Duncan Charters, 25 Elsah Hills Drive, Elsah, IL 62028-9750 Usono; tel. 1-618-374-2453, fakso: 1-618-374-5122. Internet: charters@csc1.prin.edu. *(Kunordigo, planado, rilatoj kun UEA kaj la movado, instruista trejnado)*

Vic-prezidanto: Prof. Ronald J. Glossop, 8894 Berkay Ave., Jennings, MO 63136, Usono. Tel. (314) 869-2303. *Eksteraj rilatoj, statistikado, instruado de infanoj.*

Sekretario: Marija Beloševiĉ, Sveti Duh 130, HR-41000 Zagreb-Crnomerec, Kroatio. Tel. (38 41) 57 60 92. *Landaj sekcioj, membro-varbado, konferenca administrado kaj ne-faka programo.*

Kasisto: Bertil Andreasson, Södra Rörum pl. 455, SE-242 94 Hörby. Tel. (46 415) 501 52. *Financo, konferencaj financoj. Membraro.*

Vic-sekretario: Prof. Zhang Danchen, General Foreign Languages Dept., Huazhong Normnal Univ., CN-430070 Wuhan, Ĉinio. *Azia agado, ekzamenoj en Ĉinio kaj Azio.*

Membro: D-ro So Jinsu, Dept. de Ekonomiko, Univ Kangnam, Kugali Kihung-up. Yongin-gun, Kyonggi-do 499-900, Koreio. Tel. (0331)281-5500. Faks. (0331)281-3604. *Universitata agado. Konferenco 1994.*

Membro: D-ro Till Dahlenburg, Feldstr. 13, DE-19412 Brüel, Germanio.Tel. (49 38483) 528. *Ekzamenoj, faka konferenca programo. Metodikaj seminarioj.*

Estrara komisiito: Zsuzsa Barcsay, Bem Rakpart 25/B, HU-1011 Budapest, Hungario. Tel. (36 1) 201-2342. *Gimnazio de ILEI. Servoj al instrustoj, trejnado de instruistoj.*

Estrara komisiito: Stefan MacGill, Fácán köz. 9/2, HU-2030 Érd, Hungario. *Eldonado*

BERNARD GOLDEN

KOMPLIKA TRANSITIVECO EN ESPERANTO

KAJ SIMPLIGITA TRANSITIVECO EN IDO

Parto I. Kialoj de malfacilaĵoj

1.0 Enkonduko

La 24-an kaj 25-an de februaro 1993 okazis en Budapeŝto la 5-a Pedagogia Konferenco por instruantoj de Esperanto. Ĝia ĉeftemo estis la transitiveco de verboj. La referaĵoj pri transitiveco traktis la temon precipe laŭ la vidpunkto de praktika instruado, do estis klarigitaj la klasifo* de verboj en Esperanto kaj la reguloj por la uzo de la sufiksoj „-ig" kaj „-iĝ". Mia kontribuaĵo, kiu celis prezenti la problemaron rilate transitivecon en larĝa perspektivo, estis reverkita en la nuna formo por publikigo en *Internacia Pedagogia Revuo(IPR)*.

Mi jam skribis en pluraj artikoloj, ke Esperanto estas simpla lingvo, sed ĝi havas kelkajn malfacilajn gramatikaĵojn. Unu el ili, kiu estas preskaŭ nesuperebla stumbligilo, estas la transitiveco de verboj. La rezulto estas, ke la eraroj en la lingvouzo estas eternaj, ĉar ili ripetiĝas ĉe ĉiu nova generacio de lernantoj, kaj ne estas iu ajn indiko, ke ili malaperos en la estonteco, malgraŭ la enkonduko de plej moderna lingvoinstrua metodiko. Plue, la samaj misaĵoj estas universalaj, ĉar ili karakterizas ĉiujn nivelojn de lingvoalproprigo, senkonsidere de la gepatra lingvo aŭ klereco de la uzantoj de la lingvo. Dokumentado pri tiu fenomeno troviĝas en la sekvaj sekcioj.

1.1 Eternaj eraroj

Duboj pri la ĝusta formo de verboj estiĝis tre frue en la historio de la lingvo. Jam en 1909 Émile Boirac, en la „Antaŭparolo" de sia *Plena Vortaro* konsilis, ke la du sufiksoj „-ig" kaj „-iĝ" estu uzataj „nur en okazo de efektiva bezono"(1). Ses jardekojn post publikigo de la komento de Boirac, alia leksikografia verko, *Plena Ilustrita Vortaro(PIV)* ankoraŭfoje riproĉis esperantistojn, kiuj uzas la transitivigan sufikson „-ig" kiel necesan karakterizilon de ĉiu transitiva verbo, tiel superflue kaj taŭtologie aldonante ĝin al simplaj transitivaj radikverboj, kiuj tute ne bezonas ĝin (2). Nun, okdek jarojn post la admono de Boirac kaj du jardekojn post la klarigo de PIV, samspecaj eraroj ankoraŭ makulas tekstojn en Esperantaj publikigaĵoj kaj agacas orelojn en konversacioj.

1.1.1 Ekzemploj de la superflua uzo de „-ig" kaj „-iĝ"

Du nuntempaj aŭtoroj, en kies verkoj svarmas misuzitaj verbformoj, estas eksprezidanto kaj antaŭa membro de la Akademio de Esperanto. En 1985 Fernando de Diego publikigis sian analizon de la lingvouzo en la ro-

*[Noto de la Red.: Mi demandis sinjoron Golden, ĉu li intence uzas *klasifi* anstataŭ *klasifiki*. Li respondis en formo de artikolo. Vidu la postnoton!]

mano *Montara Vilaĝo*, esperantigita de la Akademia eksprezidanto (3). Inter la eraroj, kiujn de Diego trovis, ne malmultaj estas misaj verbformoj kiel la sekvaj:

a) Li foje tiel enuiĝas (devas esti „*enuas*")
b) La rideton de Onjo Krizantemo anstataŭigis paŭtado (devas esti „*anstataŭis*")
c) Onjo Krizantemo disradiigis ĝojon (devas esti „*disradiis*").

La sama tradukanto faris similajn fuŝaĵojn en sia traduko de la teatraĵo *Fenikso tro ofta*, kiun Fernando de Diego recenzis (4). En tiu ĉi verko li uzis „konfuzigi" anstataŭ „konfuzi", „sulkigi" anstataŭ „sulki" kaj „submetigi" anstataŭ „submeti".

Ĉi-rilate lamas ankaŭ la lingvouzo de la antaŭa Akademiano, kiel reliefigas *Li Shijun*, la recenzinto de *Elpafu la sagon* (5). Li faras jenan komenton: „La lingvaĵo de la traduko fluas kiel facila prozo, kaj evidentaj plumeraroj kiel *teruriga, raviga* (p.131.), *konfuziga* (p.134.) kaj *ĉarmiga* (p.51.) kun superflua *-ig-* certe ne malhelpas la ĝuadon de la bela poezio."

1.2 Universalaj eraroj

Eraroj en la uzo de transitivaj kaj netransitivaj verboj estas universalaj eraroj, ĉar ili ne estas limigitaj al la lingvouzo de komencantoj aŭ lernantoj. Vere konsterna estas la misuzo de verbformoj en verkoj de multjaraj spertuloj, membroj de Akademio de Esperanto kaj ankaŭ t.n. bonaj verkistoj.

1.2.1 Ekzemploj ilustrantaj pli vastan misuzon

Akademianoj uzis la malĝustan verbformon en la sekvaj citaĵoj.

a. La sciencistoj kutimiĝis nomi tiujn elementojn per nomoj finantaj per la fina silabo -ium...
b. Eĉ sur la oceano eĥas la evento.
c. Tiel mi startis la Pekoteko-projekton...

La ĝustaj verboformoj estas: a. *finiĝantaj*, b. *eĥiĝas*, c. *startigis*

En la enkonduko de la bibliografio de miaj verkoj pri transitiveco de verboj en Esperanto, mi citas dek erarhavajn frazojn ĉerpitajn el verkoj de metodologoj pri Esperanto-instruado (6). Inter la eraroj, kiujn mi rikoltis en laboraĵoj kaj tradukaĵoj de studentoj en la Esperanto-fako de Universitato „Lóránd Eötvös", publikigitaj en *Esperantologiaj Kajeroj*, estas jenaj:

a. ...ĉe kompleksaj verboformoj ununombro kaj pluralo strikte diferenciĝas...(devas esti *diferencas*)
b. ...ŝprucas la akvon en la vizaĝon...(devas esti *ŝprucigas*)
c. ...daŭĝeranta la naciajn originalecon kaj sendependecon...(devas esti *endaŭĝeriganta*)

2.0 Kialoj de la neinstruebleco kaj nelernebleco de verba transitiveco

La eterneco kaj universaleco de erara uzo de verboj postulas, ke oni serĉu la kialojn. Kvar kontribuantaj faktoroj prezentas sin: 1. nekapablaj lernantoj; 2. nekompetentaj instruantoj; 3. mankhavaj lerniloj; 4. malfacila lingvo

2.1 Nekapablaj lernantoj

Troviĝas en ĉiu kurso plej diverse dotitaj lernantoj, inter kiuj estas tiuj, kiuj ne kapablas enkapigi eĉ la plej simplajn gramatikajn regulojn. Kelkaj estas malinteligentaj, aliaj maldiligentaj aŭ apatiaj, sed ne ĉiuj apartenas al tiuj kategorioj. Oni ne forgesu, ke ĉiuj lernantoj, kies cerbo kaj parolaj kaj aŭdaj organoj ne estas difektitaj, kaj senkonsidere, ĉu ili apartenas al la mense aktivaj aŭ malpli kleraj grupoj, sukcesis lerni sian gepatran lingvon sen iu ajn bezono scii gramatikajn regulojn.

2.2 Nekompetentaj instruantoj

Estas sciate, ke la plejmulto de la homoj, kiuj instruas Esperanton, ne estas profesie kvalifikitaj, t.s. ili ne posedas pedagogian scion pri instruado kaj specife pri lingvoinstrua metodologio. Se apud tiuj mankoj aldoniĝas ankaŭ neadekvata regado de Esperanto kaj nur supraĵa kompreno de la gramatikaj reguloj, estas evidente, ke bonaj rezultoj en kursinstruado ne estas atingeblaj. Cetere, la profesiaj instruistoj kaj metodikistoj, kiuj verkas faklibrojn pri instrumetodoj, ne povas faciligi prezentaĵon de la temo de transitiveco, se ili mem pekas kontraŭ la reguloj. Ili ne nur prezentas malbonajn modelojn por siaj lernantoj, sed ankaŭ konfuzas ilin. En sekcio 1.2.1 mi menciis erarojn en fakverkoj de metodikistoj kaj ankaŭ redakcianoj de IPR. Pli bizara malĝustaĵo estas hezitado en la sama publikigaĵo pri la uzo de samaj verboj, jen sen sufikso, jen kun ĝi. La sekvaj kvar ekzemploj venas de bone konata metodologia traktato (7). La verboj estas *sintezi* kaj *ekzerci*:

a) ...en la legaĵoj oni povas sintezi la leksikan materialon de la leciono...
b) Sed la lernolibro fariĝos vere scienca verko nur tiam, kiam ĝi baziĝos sur sciencaj esploroj kaj sintezigos la lingvan...materialon..
c) ...se li rimarkis, ke certa materialo ne estas sufiĉe alproprigita, oni devas ĝin reekzerci
ĉ) Tiamaniere la analitika legado ekzercigas la jam konatan fenomenon...

Mi kritikis la lingvouzon en *Esperantologiaj Kajeroj*(8), periodaĵo redaktita kaj eldonita de instruistoj kaj studentoj de la Fako pri Ĝenerala kaj Aplika Lingvistiko de la Scienca Universitato „Lóránd Eötvös" en Budapeŝto, kaj montris, ke transitiveco, krom aliaj gramatikaĵoj, ne estas plene primajstrebla fare de studentoj en la tieaj kursoj eĉ post tre intensa metodologia trejnado. Ĝuste tiuj studentoj kun scio ankaŭ pri lingvistiko, diplomiĝos por instrui Esperanton. Miaj observoj ne plaĉis al la estro de la fako, kaj li feble pretekstis, ke la malfacilaĵoj de la studentoj estas la rezulto de interfero. Tio okazas, kiam samsignifa verbo en la gepatra lingvo de lernantoj ne havas la saman transitivecon kiel la verbo en Esperanto. Ekzemple, hungarlingvuloj ofte uzas „enui" transitive kun rekta objekto, ĉar la ekvivalenta hungara verbo *megunni* estas transitiva kun sekva substantivo

en la akuzativa kazo. Mia demando estas: kial ne ekzistas metodologiaj rimedoj por nuligi la misefikon de interfero?

Ankaŭ el Francio venas atestaĵo, ke homoj dezirantaj instrui Esperanton estas malbone kvalifikitaj por tiu tasko. Rimarkoj de la direktorino kaj de la prezidanto de Franca Esperanto-Instituto, publikigitaj en la agadraporto pri la lernojaro 1988-1989 priskribas malkuraĝigan situacion:

> „...La kursgvidantoj tamen atentu pli altigi la nivelon de la triagradaj kursoj. Ili konstante pensu, ke tiaj kursoj direktiĝas al instruontoj kapablaj respondi ĉiujn lingvajn demandojn de la gelernantoj. La nombro de la malsukcesoj en la Atesto pri Kapableco elokvente montras, ke la kandidatoj tute ne regis la Esperantan gramatikon. Kiel ili povus ĝin instrui?" (9).

2.3 Mankhavaj lerniloj

Kontribuas al nebona scio de la uzo de verboj en Esperanto ankaŭ neadekvata traktado de tiu ĉi parolelemento en lernolibroj kaj vortaroj. Unue, malmultaj gramatikoj enhavas racian kaj detalan prezentadon de verba transitiveco. Plej ofte estas nur klarigo pri la maniero transitivigi netransitivajn verbojn per aldono de la sufikso „-ig" kaj netransitivigi transitivajn verbojn per „-iĝ". Kelkfoje la sola indiko pri la transitiveco de verbo estas la traduk-ekvivalento en la etnolingvo de la lernanto. Mi denove akcentas, ke problemo estiĝas, se samsignifa verbo en ambaŭ lingvoj ne havas la saman transitivecon. Bedaŭrinde, ne ĉiuj aŭtoroj de lernolibroj eĉ konscias pri la fenomeno de interfero, do ili ne atentigas lernantojn pri la diferencoj.

Pluraj lernolibroj kaj gramatikaj kompendioj konsilas, ke, kaze de dubo pri la transitiveco de verbo, oni konsultu vortaron. Estas riproĉende, ke ne ĉiuj vortaroj indikas la transitivecon de verboj; cetere, okazas malakordoj inter leksikografoj; plue, troviĝas vortaroj, en kiuj kelkaj verboj estas signitaj kiel transitivaj kaj ankaŭ netransitivaj. Ekzemple en *Plena Vortaro* (PV, 1934) pluraj verboj ricevis la signon „x", kiu indikas, ke oni povas uzi ilin aŭ transitive aŭ netransitive. Male, en PIV (1970) „x" mankas, kaj aperas post verboj nur „*tr*" aŭ „*ntr*". Ŝajnas, do, ke ne plu estas eble uzi la saman verbon ambaŭmaniere; tamen, se oni trakribras la enhavon de PIV, estas eble trovi ne malmultajn verbojn, kiuj estas uzeblaj jen transitive, jen netransitive, depende de la kunteksto, kiu nuancas la sencon de la verbo. Ekzemple, „*regi*" havas ses difinojn; laŭ la 1-a, 3-a kaj 5-a, la verbo estas netransitiva, kaj laŭ la 2-a, 4-a kaj 6-a signifoj ĝi estas uzebla transitive. Pluraj aliaj verboj kondutas same. Pro tiu arbitra klasifo de verboj en Esperanto, unu el miaj korespondantoj esprimis la opinion, ke en kelkaj kazoj, ŝajnas, la transitiveco de Esperantaj verboj estis decidita per la falo de jetkubo.

2.3.1 Ŝanĝo de difinoj en PV kaj PIV

Kiu volas pli profunde penetri en tiun ĉi kaosan gramatikan labirinton, komparu la difinojn de la adjektivoj „transitiva" kaj „netransitiva" en PV kaj PIV.

PV (1934)	PIV (1970)
Transitiva. *Kvalifikas verbon, kiu esprimas agon rekte pasantan de subjekto al objekto kaj kies komplemento estas en esperanto senpere kaj senprepozicie signita per akuzativo. Ekz.*: movi, frapi, turni, lavi, komenci, ĉesigi, enuigi, daŭrigi.	**Transitiva** *(pp verbo) Tia, ke ĝi esprimas agon, kiu pasas de subjekto al objekto; = transira; ekz.*: frapi, lavi, komenci, daŭrigi ion; ĝoji, ridi pri io; aparteni, plaĉi, utili al iu; diferenci de io *ktp.* RIM.1 *Kiel oni vidas el tiuj ekzemploj, la objektoj de la transitivaj verboj povas esti aŭ rekta (=senprepoziciaj) aŭ nerektaj (prepozicihavaj).*
Netransitiva. *Kvalifikas verbon, kiu esprimas agon fariĝantan en la subjekto mem kaj ne pasantan de ĝi al la objekto; komplemento de tia verbo estas antaŭata de prepozicio. Ekz.*: ĝoji, penti, indigni, iri, fali, promeni, veni, ĉesi, daŭri, okazi, morti.	**Netransitiva** *(pp verbo) Tia, ke ĝi esprimas agon, kiu koncernas nur la subjekton kaj ne pasas al ia objekto; = netransira; ekz.*: iri, fali,ĉesi, daŭri, morti. RIM.2 *La netransitivaj verboj povas havi post si nur adjekton aŭ predikativon, sed ne objekton.*

Rimarku, ke en la periodo de 36 jaroj ŝanĝiĝis la transitiveco de *ĝoji*; en 1934 PV signis ĝin kiel netransitivan; en 1970 PIV listigas ĝin en la formo *ĝoji/pri io* kiel nerektan transitivan verbon. Tamen, ĉe la kapvorto *ĝoji* en PIV ĝi estas signita kiel netransitiva!!!

2.4 Malfacila lingvo

La kvara kaŭzo de malfacileco estas la lingvo mem. Priskribaj gramatikoj, celantaj provizi precizajn regulojn por uzo de la lingvo, estas multe pli komplikaj ol didaktikaj gramatikoj, kies primara tasko estas simpligi la regulojn por ebligi praktikan kaj efikan instruadon. Same kiel malakordo karakterizas la laboron de leksikografoj, ĝi manifestiĝas ankaŭ en la komplikaj teoriaj klasifoj, kiujn gramatikistoj formulas por priskribi la verbsistemon de Esperanto. Tiel, krom transitiva kaj netransitiva kategorioj,

ankaŭ la nocioj de transitivaj verboj estas uzataj absolute, ambaŭrolantaj verboj, dudirektaj verboj, ambiguaj verboj, la etimologia figuro kaj, fine, la esceptoj estas klarigeblaj kiel rezulto de etnolingva influo!

Ankoraŭ ne ekzistas kontentiga respondo al la fundamenta demando de ĉiu lernanto kaj uzanto de Esperanto: kiel estas eble rekoni la naturon de ĉiu verbo? Esperanto havas markilojn por diferencigi la ĉefajn parolelementojn, kazojn de substantivoj kaj verbajn tensojn kaj modojn, sed mankas al ĝi markilo indikanta la transitivecon de verbaj radikoj. La du sufiksoj, „-ig" kaj „-iĝ" ne funkcias tiucele, ĉar ili estas uzeblaj en ĝusta maniero, *nur se oni scias antaŭe*, ĉu la radiko mem estas transitiva aŭ netransitiva. Ĉi-kuntekste estas interese ekzameni la tabelon de ekvivalentoj de „-ig/-iĝ" en la hungara lingvo, kiun Szerdahelyi inkludas en sia universitata lernolibro de Esperanto (10). La sistemo de pluraj markiloj de transitiveco kaj netransitiveco estas multe pli komplika ol tiu de Esperanto, kun 16 manieroj modifi la signifon de radikaj verboj kaj adjektivoj. Malgraŭ la bezono de hungarlingvuloj enkapigi tiujn diferencojn en sia propra lingvo, ne okazas pozitiva transfero, hungaraj lernantoj kaj uzantoj de Esperanto daŭre mispaŝas, elektante malĝustajn verboformojn.

2.4.1 Gramatikistoj konfesas, ke malfacilaĵo ekzistas

Malgraŭ la blufanta propagando senĉese distrumpetita de simplanimaj homoj pri la facileco de Esperanto, pli sobre pensantaj gramatikistoj devas malkaŝe konfesi, ke transitiveco prezentas apartan malfacilecon al lernantoj de Esperanto. F. Baronnet en unu el siaj *„Lingvaj Anguloj"* klarigas, ke „estas neeble formuli ĝeneralan regulon por helpi la lernanton en la ĝusta sintaksa uzado de verbaj formoj"(11). PIV apogas tiun mornan konstaton per jenaj vortoj: „La klasifikado de verboj inter „transitivaj" kaj „netransitivaj" prezentas iajn malfacilaĵojn pro la elasteco de uzado de la akuzativo en nia lingvo" (12). J.C. Wells en sia Esperanta kaj angla vortaro konsilas al studantoj „aparte atenti la ĝustan uzon de transitivaj kaj netransitivaj verbaj formoj, ĉar tiu punkto - eble la plej malfacila punkto de la gramatiko de Esperanto por angleparolantoj - estas la fonto de multaj eraroj"(13). Eĥo de la vortoj de Wells troviĝas en nova angla-Esperanta vortaro nuntempe kompilata de Peter J. Benson (14), kiu ripetas, ke „unu el la plej oftaj eraroj de uzantoj de Esperanto estas uzo de transitiva verbradiko en netransitiva senco aŭ, male, sen la konvena afikso „-iĝ" aŭ „-ig", aŭ kun unu el tiuj ĉi uzata redunde." En la kopioj de malnetaj paĝoj de tiu vortaro, kiujn mi havis okazon ekzameni, mi rimarkis, ke Benson signas kelkajn verbojn per transitiveco, kiu ne akordas kun la registrado en PIV! Ĉu la usona leksikografo decidis ludante je fronto aŭ dorso de monero?

2.4.2 Gramatikaĵo, kiu postulas grandan prezon de lernantoj

Sendube, oni pagas grandan prezon por tiu gramatikaĵo, ĉar ĝi faras peniga la instruadon kaj malkuraĝigas lernadon de la lingvo. Por primajstri

la uzon de transitivaj kaj netransitivaj verboj en Esperanto, estas necese parkerigi multajn ekzemplojn, senĉese konsulti vortarojn en kazoj de necerteco, kaj ekzerci sin konstante, ĉar ĉiu nova verbo prezentas la saman problemon. En la lernej-ĉambro aŭ hejme oni ja povas serĉi informojn en lerniloj kaj vortaroj, sed tiuj rimedoj ne estas utiligeblaj fare de konversaciantoj en ĉiutagaj situacioj. Plua komplikaĵo estas la klarigo en *Plena Analiza Gramatiko* (PAG), ke en Esperanto, kontraŭe al multaj lingvoj „unu verbo ne povas esti samtempe transitiva kaj netransitiva, konservante la saman sencon"(15). Tio signifas, ke lernanto devas enkapigi ankaŭ la sencnuancojn, kiuj diferencigas la transitivan disde la netransitiva uzo de verbo, kies formo restas senŝanĝa. Al tiu malfacilaĵo aldoniĝas la jam menciita manko de akordo rilate transitivecon inter kelkaj Esperantaj verboj kaj samsignifaj etnolingvaj verboj. Kiel jam menciiite, laŭ didaktika vidpunkto tio malhelpas, ke lernantoj faru pozitivan transferon de lernataĵoj.

Ĝis nun estis prezentita la malhela aspekto de la demando pri transitiveco en Esperanto. Ĉu eblas konkludi, ke ankaŭ en la estonteco primajstrado de tiu gramatikaĵo estos same senperspektiva?

Parto II. Reagaj tendencoj

3.0 Kvar tendencoj en plua pritraktado de la demando

En 1988 aperis en la revuo *Esperanto* mia artikolo titolita „Neinstruebla, nelernebla gramatikaĵo?" (16). Ĝi vekis multe da intereso, kaj dum la sekva jaro estis publikigitaj reagoj de legantoj. Preskaŭ senescepte ili venis de diletantaj, kabinetaj gramatikistoj, kiuj provis defendi per tordita rezonado kaj harfendantaj argumentoj la ekziston de la kategorioj de transitivaj kaj netransitivaj verboj en Esperanto. En tiuj reagoj manifestiĝis kvar tendencoj: 1. rezignacio, 2. teoriumado, 3. tolerado de eraroj, 4. akcepto de la nocio de ambaŭtransitiveco. La unuaj du reagoj estas esence negativaj, ĉar en la pasinteco ili alportis nenion al la solvo de la problemo. Kion tiuj naivuloj ne komprenas, estas ke ne eblas defendi sistemon, kiu estas tiel ĝiskerne malfacila kaj komplika, ke oni ne povas instrui, lerni kaj uzi ĝin. Kontraŭe, starpunktoj 3 kaj 4 prezentas trarompon de novaj manieroj pensi pri transitiveco kun la celo elimini ties malfacilecon.

3.1 Rezignacio

Ĉe tiu ĉi tendenco-poluso troviĝas esprimoj de defetismo, negativismo kaj nenifarado. Ekzistas simpluloj, kiuj argumentas, ke vere ne estas problemo! Ekzemple, unu el ili asertas, ke, ĉar neniu el la reguloj de la *Fundamenta Gramatiko* tuŝas la temon de transitiveco, estas neniu motivo okupiĝi pri ĝi. Laŭ alia klarigo, ĉar troviĝas gramatikaj konstruoj ebligantaj uzon de la akuzativo anstataŭ prepozicio, la demando pri transitiveco fariĝas gramatika bagatelo. Ankoraŭ unu nerealeca vidpunkto volas kredigi, ke nur malbone uzantoj de Esperanto ne scipovas ĝuste uzi verbojn en la lingvo.

Dementas tiun falsan aserton la lingvouzo de t.n. bonaj aŭtoroj, Akademianoj kaj metodikistoj pri instruado, kiuj eraras same kiel ordinaraj esperantistoj. Negativa estas ankaŭ la rezonado, ke Esperanto estas aposteriora lingvo, kiu ĉerpis sian leksikon el etnaj lingvoj, kaj pro tio oni devas akcepti la „mankhavajn" trajtojn de tiuj lingvoj, eĉ se ili malfaciligas lernadon. Tamen, en la tendaro de la rezignaciuloj aŭdiĝas ankaŭ plendoj, ke ne estas facile dediĉi sin al intensa, daŭra kaj efika lernado de gramatikaj malfacilaĵoj de Esperanto, ĉar oni ne disponas la bezonatan didaktike uzeblan gramatikan lernilon. Tiuj, kiuj proponas publikigon de tia lernolibro, ja konscias, ke ne havas respondon la demando „kiu verkos ĝin?"

3.2 Teoriumado

Inter la partoprenintoj en la diskuto pri transitiveco estas homoj apartenantaj al la kategorio de kabinetaj gramatikistoj. Ili tre malofte publikigas beletrajn verkojn aŭ eĉ fakverkojn sur la tereno de sia propra profesio aŭ metio, sed okupiĝas primare pri gramatikaj demandoj, elcerbigante teoriojn pri vortformado kaj sintakso, inventante novajn terminojn kaj redifinante transitivecon. Iliaj novaj klasifoj de Esperantaj verboj baziĝas jen sur analizo de komplementoj, jen sur la semantika enhavo de verboj, jen sur la rilato inter subjekto kaj verbo. „Kiom da kapoj, tiom da ĉapoj." Tiuj klasifoj de verboj ne ĉiam kongruas kun tradiciaj traktadoj, kaj oni ne povas facile vidi evidentajn avantaĝojn en la novaj kaj pli komplikaj grupigoj.

Unu el la teoriumuloj, skribante pri etnaj lingvoj, prezentis la nocion, ke „universala lingvo ne implicas universalan sistemon", do ne eblas aŭtomatigi transitivecon en Esperanto. Nu, se oni planas lingvon, oni ne faru tion laŭ la modelo de ekzistantaj lingvoj: ja estas pli racie plani ĝin, por ke ĝiaj gramatikaĵoj estu facile, eĉ aŭtomate trakteblaj. Ju pli lernantoj devas pensi pri la elekto de formoj en lingvo, des pli malfacila estas tiu lingvo. Multenombraj ekzemploj troviĝas en ĉiuj etnolingvoj. Eble la plej malpraktika teoria maniero proponita por determini transitivecon estas la semantika analizo de ĉiuj verboj. La malavantaĝo estas, ke ĝi ne estas rapida maniero sed postulas multe da cerbumado por scii, ĉu verbo estas transitiva aŭ netransitiva. Tian analizon oni povas fari sidante en kabineta fotelo, ne kiam oni staras surpiede, parolante la lingvon.

Objektiva pritakso de la lingvouzo de esperantistoj dum pli ol unu jarcento, kaj analizo de la pretendoj kaj rezultoj de la metodiko pri instruado de Esperanto, evoluinta dum la sama periodo, indikas, ke la kontribuo de la teoriumuloj estis kaj estos senvalora. Kelkaj esperantistoj, reagante malfavore al la proponoj de la kabinetaj gramatikistoj, karakterizas la obskurajn kaj nekompreneblajn klarigojn kiel „tro altnivelajn" kaj „pli akademiajn ol praktikajn", kaj ili akcentas, ke multe da homoj ne povas apliki la teoriojn en praktika maniero. Konklude, la ellaborado de pli kaj pli

densa teoria fono por klarigi la fenomenon de transitiveco en Esperanto estas vana agado.

Inter la esperantistoj, kiuj pledas por facileco de Esperanto, estas Werner Bormann (17). Li argumentas, ke uzantoj de la lingvo bezonas simplajn kaj rapide decideblajn regulojn. (Ĝuste tiu kriterio de facila apliko de reguloj malestas en la diskutoj de teoriumuloj.) Bormann insistas, ke Esperanto povas konkuri kontraŭ etnolingvoj nur, se ĝi distancas de ili per la kvalito de facileco. Tamen, li pesimisme rimarkigas, ke la nuna evoluo de la lingvo ne iras en la direkto al facileco; male, pli komplikaj reguloj kaj pligrandiĝanta vortprovizo faras Esperanton pli malfacila de jaro al jaro. En la sekvaj sekcioj ni vidos, ke oni povas esti optimisma pro nova tendenco, kiu komencas disvolviĝi en la pensoj de esperantistoj okupiĝantaj pri la estonteco de Esperanto. Temas pri nova maniero rigardi la rilaton inter la normlingva uzo kaj devia lingvouzo de Esperanto.

3.3 Tolero de subnorma lingvouzo: la demotika kaj la elitalingvaĵoj

Apogantoj de tolero de subnorma lingvouzo, nome permeseblaj devioj de la starigitaj gramatikaj reguloj, prezentas atestaĵojn pruvantajn, ke ne ĉiuj lernantoj de Esperanto estas same kapablaj ĝuste apliki la gramatikajn regulojn. Sekve, ili parole kaj skribe uzas pli simplan, senbalastigitan formon de la lingvo. Laŭ modera, limigita vidpunkto de tolero, oni rigardas la subnorman nivelon de lingvouzo nur kiel provizoran stadion, kaj oni instigas uzantojn de la „primitiva ĵargono" aŭ „dialekto" al plua lernado por akiri pli profundan lingvoscion. Tamen, ne ĉiuj esperantistoj sentas bezonon perfektigi sian scion de Esperanto. Multaj estas kontentaj, se ili sukcesas adekvate plenumi ĉiujn siajn dezirojn en Esperantujo, malgraŭ sia lama esprimkapablo. Rezultas el tio, ke la rudimenta lingvo de kolektantoj kaj kongresemuloj pli kaj pli disvastiĝas sur la teritorio de la Esperanta lingvokomunumo. Por diferencigi la „unugrošan" Esperanton karakterizan de la unua kurso kaj la elementa lernolibro disde la literatura lingvo tute laŭregula kaj posedanta ampleksan vortprovizon, estas utile uzi la nomojn „demotika lingvaĵo" por la unua variaĵo kaj „elita lingvaĵo" por la normlingvo. Klarvidaj pensuloj konstatas, ke verkado de diklibraj komentarioj pri gramatikaj malfacilaĵoj en Esperanto apenaŭ nuligos persistajn trajtojn de la demotika lingvaĵo, kiu nuntempe fakte karakterizas la parolan lingvon kaj certagrade ankaŭ la skriban. Sekve, provizora tolero de devia lingvouzo devas transformiĝi al akcepto, rezulte de nova interpreto de la koncepto de normlingvo. Tio povas okazi post modifado de gramatikaj reguloj, procedo, kiun ilustras la ebla traktado de transitiveco en la estonteco.

[En la III-a, lasta parto temos pri la proponita solvo. Vidu la sekvan numeron de IPR! Noto de la Red.]

Rotoj

1) Émile Boirac. *Plena Vortaro Esperanto-Esperanto kaj Esperanto-Franca*. Paris: Hachette; 1909-1910. 430 pĝ. Vd.pĝ. xiii.
2) *Plena Ilustrita Vortaro*. Paris: Sennacieca Asocio Tutmonda: 1970. 1299 pĝ. Vd.sub „-ig/", pĝ.411, Rim.5.
3) Fernando de Diego. La degenero de William Auld. Recenzo pri *Montara Vilaĝo*. Saarbrücken: Arthur E. Iltis; 1985. 11 pĝ.
4) Fernando de Diego. Mi amis lian vivon, sed ne lian morton. Recenzo pri *Fenikso tro ofta* de Christopher Fry, unu-akta komedio tradukita el la angla de W.Auld. Heroldo de Esperanto, 9/1984 (1732), pĝ.4.
5) Li Shijun. Bukedo de popola poezio. Recenzo pri *Elpafu la sagon*; *El la buŝa poezio de la mondo* kompilita de Tibor Sekelj. Esperanto, julio 1984, pĝ. 134.
6) Bernard Golden. La transitiveco de verboj en Esperanto - bibliografio de verkoj de Bernard Golden. *Informilo por Interlingvistoj*, 1993, n-ro 2 (5), pĝ.1-2.
7) István Szerdahelyi. *Metodologio de Esperanto*, Budapest: Tankönyvkiadó; 1975. 377 pĝ.
8) Bernard Golden. Kritiko de la lingvouzo en universitata esperantologia revuo. *Esperanto Teacher*, 1986, n-ro 151, pĝ. 7.
9) Jeannine Vincent, Pierre Babin. Franca Esperanto-Instituto. Agadraporto pri la lernojaro 1988-1989. *SAT-Amikaro*, decembro 1989, n-ro 448, pĝ. 76.
10) István Szerdahelyi. *Eszperantó. Bevezetés és nyelvgyakorlatok*. Budapest: Tankönyvkiadó; 1976. 307 pĝ. Vd.pĝ. 81-82.
11) F.Baronnet. *Lingvaj Anguloj*. Laroque Timbaut: La Juna Penso; 1979. 79 pĝ. Vd.pĝ. 32-33.
12) *Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto*. Paris: SAT; 1970. Vd.pĝ. xiii.
13) John C. Wells. *The E.U.P. Concise Esperanto and English Dictionary*. London: The English Universities Press Ltd; 1969. 419 pĝ. Vd.pĝ. 19.
14) Peter J. Benson. *Comprehensive English-Esperanto Dictionary*. Nuntempe kompilata en Usono. Vd. sekcion 7, pĝ. 5 de la malneto de marto 1988.
15) Kalocsay, G. Waringhien. *Plena Analiza Gramatiko de Esperanto*. Rotterdam: UEA; 1980. 599 pĝ. Vd. sekcion 119, pĝ. 162-163.
16) Bernard Golden. Neinstruebla, nelernebla gramatikaĵo? La transitiveco de verboj en Esperanto. *Esperanto*, novembro 1988, pĝ. 188-189.
17) Werner Bormann. Mondlingvo longperioda. Pĝ. 95-107 en: *Serta Gratulatoria in honorem Juan Régulo*. Vol.II -Esperantismo. La Laguna: Universidad de La Laguna; 1987. 790 pĝ. Vd.pĝ. 101-106.

Postnoto

PRAVIGO DE LA VERBFORMO „KLASIFI"

„*Klasifi*" ne estas erara

Montagu C. Butler, kiu estis membro de la Akademio de Esperanto, donis al sia tre valora konsultlibro la titolon *Klasifo de Esperantaj Temoj*. Jen lia klarigo pri la uzo de la verbformo *klasifi* anstataŭ *klasifiki*.

„Ĉu klasi, klasifi, enklasigi, klasigi, klasifiki (oficiala), aŭ klasifikacii? Mi uzis klasifi (kp. edifi, kvalifi, modifi, ratifi, rektifi, signifi, specifi. Komparu ankaŭ A. classify, classified, kun klasifi, klasifita.)"(pĝ. 3, piednoto).

La demando pri „ik" en Esperanto

La silabo „ik" kondutas tre kaprice en Esperanto. Kelkfoje ĝia enesto aŭ malesto havas neniun efikon sur la signifon de vorto; alifoje ĝi kapablas ŝanĝi la signifon. Ekzemplo de la unua kazo estas „aŭtent(ik)a". Zamenhof mem uzis „aŭtenta"; apud ĝi estis uzata kaj registrita en vortaroj „aŭtentika", kiu imitas la formon de etnolingvaj vortoj samsignifaj: A. *authentic*, F. *authentique*, Hi. *auténtico*. „Ik" evidente aldonas neniun semantikan enhavon al la radiko „aŭtent-". Ĉar ĝi ne funkcias tie ĉi kiel sufikso, ĝi estas nur balasto, do - for en la rubaĵujon!

Zamenhof uzis ankaŭ la verbformon „rektifi", kiun *Plena Ilustrita Vortaro* regsitras, sed kun resendo al „rektifiki". Tamen, Zamenhof ne estis konsekvenca, ĉar li formis la verbon „skarifiki". *Plena Vortaro* kaj aliaj vortaristoj indikas, ke ankaŭ „skarifi" estas uzebla. Nenie troviĝas racia kialo de la prefero al verbformoj kun „ik". Efektive, la elekto estas tute arbitra kaj dependas de la etimo, kiu funkcias kiel fonto de la Esperanta radiko. Se la etimo venas de la latina (classificare), itala (classificare) aŭ hispana (classificar), tiam „ik" troviĝas en la Esperanta radiko: „klasifik-". Male, se la Esperanta verbo baziĝas sur etimoj en la franca(*classifier*) aŭ la angla(*classify*), la Esperanta radiko fariĝas „klasif-". En la etnolingvaj vortoj, la sufiksoj *-ficar(e)*, *-fier* kaj *-fy* devenas de la latina sufikso *-ficare*, kiu estas variaĵo de la verbo facere „fari". Provi trovi semantikan diferencon inter „klasifi" kaj „klasifiki" estas kimero. Same vane estas doni malsamajn difinojn al „ekzota" kaj „ekzotika".

La uzo de „-ik" kiel sufikso

Kiam „-ik" funkcias kiel sufikso kaj havas signifon, tiam ĝi ne plu estas fakultativa silabo en Esperanta vorto. Tia paro estas „elektrona/elektronika". Tre ofta eraro en Esperantaj tekstoj estas la uzo de la adjetiva formo „elektrona" por kvalifi la nomon de aparato, kiu funkcias elektronike.

Bedaŭrinde, dum pli ol unu jarcento konfuzo regis sur tiu ĉi tereno de Esperanta morfologio, kaj uzantoj de la lingvo ne povis trovi klarajn gvidliniojn por la uzo de „-ik": kiam ĝi estas fakultativa, kiam ĝi funkcias kiel sufikso, kiom da signifoj ĝi havas? Lastatempe la verkanto de tiu ĉi artikolo, kiu estas la direktoro de la *Sekcio pri Ĝenerala Vortaro de la Akademio de Esperanto*, komencis esplori la problemon de la uzo kaj signifoj de „-ik" kun la celo starigi neambiguajn difinojn kaj simplajn regulojn. Rezultoj de la esploro troviĝas en jenaj du studaĵoj.

1. Esploro pri la signifo kaj uzo de „-ik" en esperanto. *La Letero de l' Akademio de Esperanto*. N-ro 10, 1990, pĝ. 4-7.
2. Enketo pri „IK" - Raporto bazita sur respondoj de la demandoj en Cirkulero 1/1990. *Cirkulero de la Akademio de Esperanto*. 24 marto 1991, n-ro 167, Aldono C, pĝ. 1-4.

LERNOLIBRO PRI INTERLINGVISTIKO
DE VERA BARANDOVSKÁ

[Noto de la Redaktoro: Dr. Vera Barandovská-Frank *estis inter la unuaj, kiuj promesis helpon al IPR. Mi ricevis ŝian novan lernolibron eldonitan en 1995 en Sibiu (Rumanio) kun la titolo* ***Enkonduka lernolibro de interlingvistiko****. La libro apartenas al la instruteko de la* Akademio Internacia de la Sciencoj *(AIS)* San Marino. *Iam vi nepre povos legi pri ĝi recenzon en IPR. Nun staru ĉi tie parto de la unua ĉapitro.]*

1.2. Interlingvistiko

1.2.1. Difinoj kaj objekto

La termino „interlingvistiko" videble devenas de la indiko „interlingua", do „internacia lingvo", kiun uzis **Giuseppe Peano** en la jaro 1903. La reprezentanto de naturalisma lingvistika skolo **Jules Meysmans** publikigis en 1911 artikolon „*Une science nouvelle*" en la revuo „*Lingua internationale*", kaj proponis nomi „interlingvistiko" sciencon, kiu esploras naturajn leĝojn de formado de ĝeneralaj helplingvoj. Li starigis demandon, ĉu ankaŭ artefaritaj lingvoj povas iĝi objekto de scienca esploro. Ĉar plejmulto da tiaj lingvoj apenaŭ trapasis la stadion de projekto, ili ja ne povas esti esplorataj kiel funkciantaj etnolingvoj. Meysmans rekomendas okupiĝi pri artefaritaj lingvoj nur en la kunteksto kun internaciaj etnolingvoj kaj transpreni ties esplormetodojn. Interlingvistiko en la kompreno de Meysmans do pritraktas ĉiujn internaciajn lingvojn, precipe naturajn kaj aldone artefaritajn. Klopodoj konstrui artefaritan lingvon (sub diversaj nomoj, ekz. *„universala", „tutmonda", „helpa", „internacia"* ktp.), do lingvokonstruado kaj lingvoplanado ekzistis jam ekde antikva epoko, sed ne ligite ekskluzive kun lingvistiko aŭ eĉ kun aparta scienco, interlingvistiko. Ĝi ekzistis kvazaŭ subkonscie kiel parto de diversaj filozofiaj, politikaj, lingvistikaj kaj aliaj esplorkampoj.

Pri interlingvistiko kiel memstara disciplino de lingvoscienco okupiĝis en la tridekaj jaroj **Otto Jespersen**. Li difinis ĝin kiel lingvistikan branĉon, kiu esploras strukturon kaj bazan koncepton de ĉiuj lingvoj, celante starigi normojn por interlingvoj, t.e. artefaritaj helplingvoj por skriba kaj parola komunikado inter homoj, kiuj ne povas interkompreniĝi per propraj gepatraj lingvoj. Laŭ tiu ĉi koncepto interlingvistiko interesiĝas pri esploroj de la problemoj de konstruo, historio kaj funkcio de planlingvoj, kiujn ĝi vidas kiel lingvojn internaciajn kaj artefaritajn.

Pri artefariteco en la lingvoj oni trovas menciojn jam ĉe pli fruaj lingvistoj, sed la koncepto de artefariteco estas diversa - oni komprenas per ĝi jen lingvonormigon, jen konstruadon de planlingvoj. Germanisto kaj jungramatikisto **Hermann Paul** mencias en sia laboraĵo *„Principoj de historio de la lingvo"* en 1880

„artefaritajn lingvojn". Diferencon inter naturaj kaj artefaritaj lingvoj li komparas kun dialekto kaj normlingvo - la unuan oni regas ekde la infanaĝo, la duan oni devas lerni. Pri artefariteco parolas en 1889 **Jean Baudoin de Courtenay** ligite al *Volapük*, la unua funkcianta planlingvo. Fakte jam en 1887 starigis *Amerika Filozofia Societo* komisionon por esplori la sciencan valoron de *Volapük* kaj dum la esploro eniris diskuton kun la *Londona Filozofia Societo* pri la lingva kaj socia flankoj de internacia komunkado. Pri internaciaj lingvoj skribis **Hugo Schuchardt**, opiniante, ke al starigo de monda lingvo kondukas praktikaj bezonoj de la homaro. Kompara historia lingvistiko, kiu klopodas rekonstrui pralingvon, povas, laŭ Schuchardt, uzi siajn metodojn por konstrui bezonatan internacian lingvon.

En la dudeka jarcento interlingvistiko alproksimiĝis ankaŭ al lingvotipologio kaj lingvokomparado, tial la laboroj **de E. Sapir, M. Swadesh** kaj **W. Collinson**, gvidataj de IALA (*International Auxiliary Language Association*) en la tridekaj jaroj okupiĝis pri fundamentoj de eŭropaj lingvoj, konstruonte sur la esplorita bazo novan helplingvon. Internaciismoj, do komunaj elementoj en etnolingvoj, iĝis grava esplorobjekto kiel estonta bazo por planlingvo.

Ekde la dudekaj jaroj ekzistis en la soveta lingvoscienco esploro de problemaro ligita al diversaj lingvoj en interetna komunikado kiel principa enhavo de interlingvistiko (sen nomi ĝin tiel). Soveta sciencisto **E.F. Spiridoviĉ** en la tridekaj jaroj konstatas, ke en lingvistiko hejmiĝas ideoj pri krea procedo en la lingvo, pri ĝiaj konsciaj ŝanĝoj, do lingvoesplorado - analizo estas anstataŭigata per lingvokreado - sintezo. Ekestas lingvoteknologio, celanta krei internacian helplingvon kaj raciigi kaj perfektigi naciajn - literaturajn lingvojn.

Simile al la koncepto de Jespersen, **Dénes Szilágyi** difinas en 1931 interlingvistikon kiel sistemon de teorioj kaj teknikoj, servantaj al produktado de interlingvoj. Li distingas interlingvistikon ĝeneralan por historia kaj kompara studoj de interlingvoj, kaj interlingvistikon normigan. Samjare formulis sian difinon **C.W. von Sydow** dum la dua internacia kongreso de lingvistoj, dirante, ke la kreo de internacia lingvo bezonas specialan lingvistikan disciplinon. **W.J. Manders** en 1950 vidas en interlingvistiko tiun branĉon de la lingvoscienco, kiu celas trovi la plej kontentigan solvon de la planlingva problemo. **H. Ölberg** (1954) diras, ke interlingvistiko okupiĝas pri internaciaj, t.e. artefarite konstruitaj lingvoj. Laŭ **Eugen Wüster** (1955) interlingvistiko, kiun li komence nomas „sinteza lingvistiko", ne nur konstatas, sed konscie influas la evoluon de la lingvo. (Li proponas terminon „planlingvo" anstataŭ „artefarita" aŭ „artefarite konstruita" lingvo.) **V. Tauli** (1968) emfazas la apartenon de interlingvistiko al aplikata lingvistiko - ĝi sisteme studu la celojn, principojn, metodojn kaj taktikojn de lingvoplanado.

La lingvoplanado mem okupiĝu pri
(1) reguligo kaj evoluigo de ekzistantaj lingvoj,
(2) pri la kreado de novaj lingvoj regionaj, naciaj kaj internaciaj.

En 1971 **A.D. Ŝvejcer** difinas lingvoplanadon kiel konscian influon sur la lingvajn ŝanĝiĝojn, alproksimigante ĝin al lingvopolitiko kaj lingvokonstruado. La lingvomodeligan aspekton emfazas **P.N. Denisov**, konsiderante la interlingvistikon kiel antaŭkibernetikan lingvomodeligon. Laŭ la *„Meyers Neues Lexicon"* (1973) temas pri lingvistika disciplino kreita komence de ĉi-jarcento, studanta strukturojn de grandaj mondaj lingvoj kun la celo krei bazon por konstruo de internacia lingvo.

Pli vaste vidas la enhavon de interlingvistiko **O.S. Achmanova** (1966): ĝi estas branĉo de lingvoscienco, kiu studas diversajn problemojn ligitajn kun la kreado kaj funkciado de diversaj helplingvoj inkluzive de aŭtomataj interlingvoj. *Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto* el la jaro 1970 diras, ke interlingvistiko estas scienco, esploranta la kondiĉojn sociologiajn, kulturajn kaj lingvistikajn de komuna norma lingvo, uzota en la internaciaj rilatoj. Alian enhavon donas al interlingvistiko **Mario Wandruszka** en 1971, komprenante sub tiu nomo esplorojn de etnolingvaj kontaktoj ĝenerale, do kontrastivan aŭ komparan lingvistikon. *La Granda Soveta Enciklopedio* el la jaro 1979: Interlingvistiko estas lingvistika branĉo, kiu studas problemojn lige al kreado kaj funkcio de diversaj rimedoj de internacia komunikado, ekz. problemojn de sociolingvistiko, bilingvismo, multlingveco, programlingvoj, kreado de kodoj kaj skribsistemoj, komunikadon de homo kun maŝino.

István Szerdahelyi skribas en sia *„Enkonduko en la interlingvistikon"* en 1979: „La aplikita lingvistiko devis rimarki, ke la nuna interlingva problemo estas novtipa demando, kreita de la moderna socio, de la evoluado de la tekniko, kiun ne plu eblas solvi per klasik-tradiciaj rimedoj. Oni devas apartigi novan disciplinon, kies tasko estu ĝuste la solvado de la interlingva problemo. Tiu nova branĉo de la aplikata lingvistiko nomiĝas interlingvistiko. La interlingvistiko devas trovi la respondon al la demando: kiu lingvo solvu la problemon: ĉu nacia aŭ internacia; ĉu estinta, estanta aŭ estonta; ĉu etna aŭ artefarita?" Li inkluzivas en interlingvistikon lingvopolitikon kaj lingvoplanadon, starigante ilin proksime al socilingvistiko, psikolingvistiko kaj lingvomodeligo.

Detlev Blanke en 1985 difinas interlingvistikon kiel interdisciplinan lingvosciencan branĉon, esplorantan internacian lingvan komunikadon kun ĉiuj politikaj, ekonomiaj, lingvistikaj, informaciteoriaj kaj aliaj aspektoj. Laŭ Blanke tamen estas la ĉefa laborkampo de interlingvistiko la problemaro de planlingvoj, nome pro jenaj kialoj:

(1) La ekesto de interlingvistiko kiel scienca disciplino estas intime konektita kun la evoluo kaj historio de planlingvoj. Multaj interlingvistikaj problemoj, kiuj ne estas rekte ligitaj kun planlingvoj, estis malkovritaj kaj difinitaj ĝuste dank' al planlingvoj.

(2) La planlingvoj estas antaŭ ĉio produkto de interlingvistikaj klopodoj, nome rimedo por plifaciligi la internacian komunikadon.

(3) Ke la planlingvoj kontentige funkcias kiel ilo de internacia komunikado, estas pruvebla teorie kaj praktike. Ili formas tiel alternativon al aliaj modeloj de raciigo de la internacia komukado (ekz. enkonduko de unu, du aŭ pluraj etnolingvoj kiel devigaj internaciaj lingvoj, perkomputila tradukado ktp.) aŭ estas kombineblaj kun ili.

(4) La plejmulto de interlingvistika literaturo - 60 % - estas publikigita en planlingvoj. Elĉerpaj interlingvistikaj esploroj ne eblas sen prikonsideri planlingvan literaturon.

(5) Preskaŭ ĉiuj interlingvistoj, aktivaj en la difinita kampo, konas planlingvojn. Blanke ankaŭ difinas esperantologion kiel memstaran parton de interlingvistiko.

S.N. Kuznecov (1987) opinias, ke interlingvistiko pritraktu interlingvajn kontaktojn kaj internacian lingvon kiel ilon de tiuj kontaktoj. Al la esplorkampo de interlingvistiko do apartenu problemoj de multlingveco, planiteco de naciaj lingvoj, uzado de interetnaj lingvoj kaj planlingvoj. Ne apartenu programlingvoj por komputiloj, etnolingvoj kiel identigiloj de sociaj grupoj ktp. Komprenante interlingvistikon kiel lingvistikan branĉon, li subdividas ĝin analogie al lingvistiko en interlingvistikon ĝeneralan kaj specialan. *Ĝenerala* interlingvistiko interesiĝu pri monda lingvosituacio, pri multlingveco kaj ĝia evoluo, pri tipoj kaj niveloj de internacia komunikado, pri reciprokaj lingvaj influoj kaj ekesto de internacionalismoj, pri klopodoj solvi la internacian komunikadproblemon helpe de kaj naturaj lingvoj, kaj planlingvoj. Laŭ Kuznecov apartenas al ĝenerala lingvistiko ankaŭ teorioj de internaciaj naturaj kaj artefaritaj lingvoj, kaj al lasta teorioj de lingvoprojektado kaj lingvofunkciado. Al *speciala* interlingvistiko apartenas teorioj de unuopaj planlingvoj, do ankaŭ esperantologio. Krome estas interlingvistiko ligita al multaj aliaj sciencoj laŭ specialiĝo en unuopaj esplorkampoj, kiel lingvopolitiko, lingvopedagogio, sociologio, lingvofilozofio, dokumentadscienco, semiotiko - speciale terminologio, scienca komunikado, informadiko, logiko, kibernetiko, problemoj de artefarita inteligenteco kaj multaj aliaj.

Nove (1992) rimarkigas **Werner Bormann**, ke planlingvistiko estas tro malvasta intereskampo de interlingvistiko, eĉ kun aldono de novaj esplorceloj kiel uzo de interlingvo kiel referenc- kaj pontolingvo, en lingvoorientiga instruado kaj simile. Al sciencaj laboroj super la lingvo adiciiĝis temaro do laŭ la nuntempa kompreno apartenu ankaŭ problemoj filologiaj. Ekzistas proponoj de **Helmar Frank, Yashovardhan** kaj **Vera Barandovská** (1991) apartigi la literatursciencajn kaj planlingvo-movadajn problemojn tiel, ke ili apud interlingvistiko formu parton de interfilologio.

La plej disvastigita kompreno de la enhavo de interlingvistiko restas tamen ligita al la internacia lingvo kaj al aro da problemoj, kiuj apartenas al ties uzado en plej diversaj sciencaj kaj praktikaj kampoj. Tia difino malfermas vastajn eblojn por nelingvistikaj sciencoj enplektiĝi kaj kontribui al interlingvistikaj esploroj.

Konkursoj kiujn aprobis la praktiko

Pasis kvin jaroj super *ILEI-komisiono pri lernejaj konkursoj*. Ĝi senhalte laboris, altiris centojn da geknaboj (lastjare ankaŭ plenaĝulojn). Dank' al praktika aplikado de Esperanto kaj al konstanta reciproka kontakto internacia, la lernantoj senpere ligiĝas al komunumo, kies manko en nia movado ofte estas kruele prema kaj sen-esperiga.

Neniu lingvo povas daŭre ekzisti sen praktika utiligo. Se la entuziasmo de la lernantoj ne estas rekaj reflamigata de ia ĝojo ligita al la fremda lingvo, ili perdiĝas, eble, por ĉiam. Kaj se ni volas esti sinceraj, ni devas konfesi ke nia lingvo alportas ankoraŭ tre malmulte kompare kun la mondlingvoj studataj en la lernejoj. Sen apartaj stimuliloj ĉe ni la komenca entuziasmo rapide velkas.

Ĉi-okaze el nia repertuaro mi deziras prezenti al vi nur du konkursojn esperante ke pluraj ekatentos pri ili kaj en Septembro aliĝos al ili novaj gekolegoj kun siaj lernantoj.

❶ *Tutlanda konkurso pri arta traduko honore al K.Kalocsay.* Ekzistas du kategorioj: *a)* aĝogrupo de 10-14 jaraj lernantoj kaj *b)* tiu de 15-18 jaruloj. Ĉar Kalocsay naskiĝis la 6an de Oktobro, la tradukado okazas tra la tuta lando en iu tago de la semajno, kiun trafas la 6a. La direktoroj, kies lernantoj aliĝis al la konkurso, ricevas la tradukotajn (ĉ. 20-liniajn) E-tekstojn unu semajnon antaŭ la dato de la konkurso en sigelita koverto. Ĝi estas malfermebla nur antaŭ la konkursantoj, kiuj tradukas la ricevitan tekston en la hungaran lingvon sub inspektado de ilia instruisto. La geknaboj havas 90 minutojn por la traduko. La tradukaĵoj estas faritaj sub kaŝnomo kaj la identigo okazas nur post la decido de la ĵurio. La ĵuriado mem okazas jene: Unue ĉiu E-instruisto korektas la verketojn de siaj lernantoj kaj taksas ilin per poentoj de 0 ĝis 10. Poste la plej sukcesaj (laŭ la instruisto) tradukaĵoj iras al tri sendependaj ĵurianoj, kiuj same poentas de 0 ĝis 10. Fine la poentoj estas adiciataj kaj la tradukintoj kun plej altaj poentonombroj ricevas diplomon de *Amika Societo d-ro K.Kalocsay* kaj librodonacon. Kune kun la diplomoj kaj donacoj la direktoroj de la koncernaj lernejoj ricevas informon en aparta letero, kie estas laŭdataj la elstara verko de la gajninto kaj la sindona, fruktoporta laboro de la E-instruisto. Ni petas la direktoron disdoni la diplomojn al la distingitoj antaŭ la tuta lernantaro ĉ. la Zamenhof-tago aŭ tuj antaŭ la Kristnaskaj ferioj. Tio estas bona okazo propagandi Esperanton sen rekta agitado.



La konkurso estas imitebla kun aŭ sen ŝanĝo en ĉiu lando kie E estas instruata en almenaŭ kelkaj lernejoj. Oni povas elekti iun el la plej elstaraj poetoj, verkistoj aŭ tradukistoj de Esperanto kaj alvoki al tutlanda konkurso la instruistaron kaj lernantaron informante ilin samtempe pri ĉiuj kondiĉoj.

La rezultoj atingeblaj sendube indas penadon. Mi volonte donas pluajn instrukciojn aŭ konsilojn al kolegoj kiuj estas pretaj preni sur sin la iniciaton en sia lando.

❷ *Internacia konkurso honore al I. Szerdahelyi.* Ĝi estas pli efika kaj grandnombra ol la antaŭa, ĉar ĝi daŭras la tutan lernojaron. Partoprenas en ĝi konkursantoj el pluraj Eŭropaj landoj, nome: Francio, Norvegio, Pollando, Kroatio, Hungario. En la nova lernojaro ekzistos tri kategorioj: unu por komencantoj, la dua por progresintoj kaj la tria por la legantoj de *Eventoj* aŭ aliaj E-revuoj.

Kiel aspektas tiu ĉi konkurso?

Ĉiumonate (de Oktobro ĝis Majo) aperas taskofolioj kun 7-8 simplaj tasketoj, per kies senerara solvo la konkursanto povas kolekti maksimume 20 poentojn (Vd. la apudan ilustraĵon). La redaktado kaj korektado iras de kolego al kolego, sekve formiĝas bona kolektivo, ĉiu povas ja enporti en la

konkurson sian apartan koloron. La korektitaj solvoj iras poste al la administra centro (Gimnazio Julia Bányai / Nyíri út 11. / H-6000 Kecskemét), kie komputilo registras la nomojn kaj poentojn, faras liston pri la aktuala stato de la konkurso en ĉiu kategorio. Post semajno la konkursantoj rericevas siajn korektitajn solvojn, kaj trovas ĉe-mete la aktualan nomliston kun nova taskofolio. Ĉio iras glate kaj akurate. La lernejoj mem kovras la poŝtajn elspezojn almetante poŝtmarkon aŭ respondkuponon. De tempo al tempo cirkulero informas pri gravaj problemoj, aktualaj eventoj, freŝaj eldonaĵoj ktp. Dank' al la grandanima helpo de HEJ la gajnintoj en ambaŭ grupoj povis senpage partopreni en IJS. La ceteraj ricevas de siaj direktoroj donacojn, diplomojn, memorkartojn kutime ĉe la solena fermo de la lernojaro.

Mi povas nur esperi ke vi ankaŭ rekonis la utilon de la prezentitaj konkursoj en la instrua-eduka procedo. Sukceso kaj ĝojo, ambicio kaj gajnemo povas animi la junulojn.

Jen du konkursoj, al kiuj en Eŭropo ĉiu povas aliĝi, necesas nur etendi la manon. Mi volonte helpos, donos informojn, proponos varbilojn. Atendas viajn leterojn:

Géza Kuricz
ILEI-komisionestro
Gimnazio Júlia Bányai
Nyíri út 11.
H-6000 KECSKEMÉT
Hungario

REGULARO POR LA LERNOJARO 1995/96
de internacia konkurso honore al I.Szerdahelyi

1. La konkurso ekestis por *lernejanoj* ĝis la aĝo de 19 jaroj, sed pasintjare ĝi malfermis siajn pordojn antaŭ ĉiuj konkursemaj esperantistoj (legantoj de *Eventoj* [illegible] iodajoj, membroj de E-kursoj, soluloj ktp.), ili formas la [illegible]

2. Por lernejanoj la [illegible] *la KATEGORIOJ!K* Limdato: la 20a de Decembro 1994
jarajn. E[illegible] 5a jaro, n-ro 3 (3 poentoj) ol 19
la duan f[illegible] (3 poentoj) arojn,
grupoj, n[illegible]
geknaboj 1. Faru ses substantivojn el la radiko *pork-* (3 poentoj) as du
taskofolio 2. Kompletigu per prepozicioj! *Maria iras ... kinejo ... sia amikino ... aŭtobuso.* as la
3. Elprenante po unu litero el ĉiuj vortoj vi havos kvin bestojn, *musko / afiŝo / pulpo / karto / oblato* (3 poentoj) is la
3. La konkur[illegible] Per la elprenitaj literoj faru la sesan bestonl (3 poentoj)
monate ap[illegible] 4. Kiuj finaĵoj mankas? *La sinjoro donis al la knab... ruĝ... pom...* . (2 poentoj) iu-
sendita al t[illegible] 5. Jen tagmanĝo. Kie vi tagmanĝas? Per kio? El kio? (3 poentoj) as
respondkupo[illegible] 6. *Nordo, sudo, okcidento, oriento.* Pri kio temas? Kion indikas kompaso? in
senerara solv[illegible] 7. Kiel ofte aperas la subaj Esperanto-gazetoj? es
Kiu el ili taŭgas por lernejanoj kaj komencantoj? *Juna amiko, Eventoj, Monato, Esperanto, El popola Ĉinio*
blanka paper[illegible] a
akceptataj!) l[illegible] 3
(redaktinto de La solvojn sendu al: *Collège Albert Camus, Esperanto-grupo*
F-62230 OUTREAU, Francio .. [illegible] taskofolieto mem

NOVA VIDBEND-SERIO DE IEI

MOTO: *Zamenhof kreis la lingvon,*
Andreo Cseh la metodon instrui ĝin,
Audrey Childs-Mee prezentas profesian praktikadon de ĝi

Per tiu ĉi devizo komenciĝas la nova eldonaĵo de la *Internacia Esperanto-Instituto*, la manlibro por la 18-hora videobendo pri Cseh-kurso.
Antaŭ ok jaroj IEI decidis filmi kompletan lingvokurson por komencantoj, gvidatan de elstara Cseh-instruistino **Audrey Childs-Mee**, por havi filmitan materialon pri la funkciado de la Cseh-metodo en la praktiko. Manke de viva grupa instruado kun la helpo de la filmo, la partoprenantoj de Cseh-seminario observas kaj analizas la plej gravajn trajtojn kaj principojn de la metodo.

Por eksperimentaj celoj kaj kolekti antaŭajn spertojn por la fina filmo, en 1988 estis surbendigita pollanda kurso. Pro la neatendita malsano de Audrey Childs-Mee (oktobre 1989) kaj ŝia baldaŭa forpaso (majo 1990) la kunlaborantoj de la instituto (**Mila van der Horst-Kolinska**, s-no **Gu Jian-hua** el Ĉinio kaj **Katalin Smidéliusz** el Hungario) decidis laŭeble plej bone utiligi la provmaterialon, alkompili ankaŭ manlibron kun la necesaj analizoj kaj aldonoj.

La surbendigita kurso troveblas sur ses videobendoj (sistemoj VHS - PAL kaj NTSC). La filmo prezentas 12 renkontiĝojn, kovras preskaŭ duonon de la materialo de „*Baza Cseh-Kurso*" de Andreo Cseh (trovebla en BCK-libro) kaj prezentas la teknikerojn de la metodo.
La materialon ni rekomendas precipe al landaj aŭ internaciaj pedagogiaj instancoj, kiuj okupiĝas pri edukado de E-instruistoj. Ĝi povas esti utila informo pri la fama metodo instrui nian lingvon kaj bazo por lecionanalizoj.
Sed necesas aldoni, ke por Cseh-seminaria laboro uzi la videbendojn rajtas NUR kompetentaj seminarigvidantoj, aprobitaj de IEI.
La instituto havas informon pri tio, ke kelkloke la aĉetita surbendigita kurso estis uzata ankaŭ anstataŭ vera instruisto por grupa instruado. Ĝi estas produktita ne por tiu ĉi celo, sekve en tiaj cirkonstancoj ne estas centprocente taŭga. Konsciante pri tio kaj konsiderante la materialon kiel bazon por praktikado, manke de kurso kaj instruisto memlernantoj povas utiligi la vidbendserion kun akompano de bona gramatika ekzercaro.
La ĵus finpretigita manlibro por la filmo mallonge prezentas la metodon mem, pritraktas ties gravajn teknikerojn kaj trajtojn plifaciligante la metodologian analizon de la kurso kaj metodo. La scenaro de la kurso donas la paŝojn de

la instruado: la pritraktitajn gramatikaĵojn, leksikon kaj frazmodelojn. Ĝi indikas ties lokon (punkto-numeron) en la originala Cseh-materialo kaj informas pri la teknikeroj kaj metodelementoj uzitaj dum la instruado.

Utilaj konsiloj, observopunktoj direktas la atenton de la observantoj je karakterizaj elementoj, interesaj punktoj; la renkontiĝfinaj diskuttemoj helpas la seminarian pritraktadon de la metodo. En la materialo troveblas kelkaj opinioj kaj rimarkoj pri la uzo de la metodo, ties funkciado, ekzemple inter azianoj kaj lernantoj kies gepatra lingvo estas ne-hindeŭropdevena. Samideanoj kaj kolegoj, kiuj opinias la metodon tro malrapida kaj neutila por intelektuloj, trovas en la vidbendo fragmenton de leciono pri lingvo inventita (de s-ino Childs-Mee). Sekvante tion kaj provante ellerni ties materialon ili verŝajne konsciiĝas pri malfacilaĵoj de tiaj lernantoj, kies gepatra lingvo apenaŭ havas similaĵojn kun la internacia lingvo aŭ ĉe kiuj mankas lingvaj antaŭkonoj, kiuj bezonas pli da praktiko.

La kompleto (filmo kaj manlibro) estas ne nur instruhelpilo, sed ankaŭ grava dokumento de la metodo kaj fakte la sola filma atesto pri la instru-laboro de la neforgesebla Audrey Childs-Mee. Servu ĝi kiel omaĝo al niaj ge-jubileuloj, al Andreo Cseh, kiu ĉijare fariĝus centjara kaj al s-ino Childs-Mee okaze de ŝia forpaso antaŭ kvin jaroj.

La kunlaborintoj esperas, ke la ideoj de Andreo Cseh kaj ties uzo en la praktiko konvinkos vin pri tio, ke multaj elementoj restos aktualaj kaj sekvendaj ankaŭ nun.

Katalin Smidéliusz

Rim: Akompana teksto por 18-hora videbend-serio pri Cseh-kurso por komencantoj, kompilita de Katalin Smidéliusz surbaze de la notoj de Audrey Childs-Mee, kun la helpo de Mila van der Horst-Kolinska kaj Gu Jian-hua.

IEI-Den Haag, 1995

DEVIGAN INSTRUADON AŬ REALAN VOJON

„Esperanto estu instruata en ĉiuj lernejoj, ĉiuj altlernejoj ... devige ... Kiel la angla, franca kaj la germana..."

Blua revo de ĉiu normala samideano, ĉu ne? Mi estis en la loko, kie la revo realiĝis. Ĉi tie mi provu transdoni miajn personajn sentojn kaj pensojn ĉi-rilatajn.

En la lernojaro 1993-94 mi instruis E-on en la *Internacia Instituto de Administro, Entreprenado kaj Juro* en ukrainia urbo Slavjansk. En tiu privata altlernejo estas kreita katedro de Esperanto kun kelkaj etataj postenoj (en la menciita lernojaro samtempe laboris 5-6 geinstruistoj) kaj foje okazadis semajnaj ekspres-kursoj, kutime en ripozejo apud la urbo. La instituto bonstatis kaj havis kelkajn milojn da nur ĉeestantaj studentoj - do, ĉiu instruisto dum la jaro instruis la lingvon al kelkaj centoj da studentoj kaj funkciis koresponda fako.

Do, danke al la energio kaj la ĥorganizaj talentoj de konata esperantisto **Gennadij Ŝilo** establiĝis la katedro kaj... Mi persone spertis tiujn: En ĉiu lernogrupo mi vidis 0-1-2-3 homojn, farantajn pli ol mi postulis (kelkaj ĝenerale ellernis E-on ie „flanke" kaj propradezire perfektigis siajn sciojn - nu, tiaj homoj kutime ne trovas E-klubon kaj rapide fariĝas „niaj homoj" - sed ĉi tie temas ne pri ili). Ankoraŭ eblas diferencigi personojn (ordinare personinojn), kiuj diligente lernas ĉion, ankaŭ Esperanton, ne tro pensante pri neceso kaj utilo. Ĉiuj aliaj ne volis lerni E-on. Aktive ne volis. Ne vidis neceson. Pri tio tute ne interesiĝis. Mi devis klopodi, ke ili almenaŭ ne malhelpu al la aliaj. Kaj temis pri absoluta plejparto...

Do, mi riskas konstati foreston de aktiva scipovo de la lingvo ĉe studentoj - sed nur tio povus pravigi ĉiujn elspezojn - alie E-o egaliĝus al ĉiuj aliaj lingvoj, malfacilaj por ellerno. Miaj lernantoj ne povis uzi E-on, kvankam sufiĉe multaj el ili bone legis tekstojn el *Juna Amiko*, respondis tipajn demandojn per tipaj respondoj, kio tamen ne atestis pri scio de la lingvo. Scipovo parkeri verson aŭ kanti romancon nur donas la esperon, ke tiu homo eble fariĝos esperantisto, kondiĉe, ke li havos allogajn perspektivojn antaŭ si.

Mi ne celas (ĉar ne povas) plene respondi ĉi tie al la demando, ĉu povas deviga instruado de E-o doni bonajn fruktojn. Mi supozas, ke se ni en Slavjansk pli bone organizus postinstruan periodon, scipovus inviti eksterlandanojn, pli pripense konvinki pri avantaĝoj de E-o - ni havus pli multe. Eble.

Sed laŭ mi, ĝenerale, ekzistas certa „magia cirklo" por ke E-o utiliĝu konkrete kaj estu senduba valoraĵo por ĉiu, same kiel nun oni konsideras la anglan. Necesas havigi ĝin al multaj personoj, krei E-medion eksteran; sed por ke oni lernu nian lingvon, bonvole kaj propradezire, bezonatas jama ekzisto de tiu medio, oni vidu, al kio celas niaj streĉoj.

E-o vere estas tre simpla (belsona, riĉesprima ktp.), sed tio enreale ne sufiĉas - tro multaj akireblaj allogaĵoj (kaj necesoj) ekzistas ĉirkaŭe. La plej certa konstato estas: fari „grandajn saltojn" ne eblas - nek en ekonomio, nek trans la lingva bariero. Vere, nur „paŝon post paŝo, post longa laboro" realigeblas iaj ŝanĝoj. Ni ja scias - kiam bluaj revoj realiĝas, ili perdas la virgecon de revoj. Nia movado estas (kaj ĉiam restos laŭ mi) iom idealisma, kiel ĉiu el ni, malgraŭ ajnaj sortaĵoj. Multaj, tre multaj homoj ne estas tiaj - kaj verŝajne tio estas normala. Sed ni devas tion konsideri. Per bastono eĉ al paradizo oni ne pelu.

Estas vere paradiza revo - centoj, miloj da homoj, studantaj E-on, komuna entuziasmo kaj rapida progreso. Sed ni ĉiam devas reale limiĝi - elekti realan vojon, antaŭvidi realajn rezultojn.

Aleksandr Malacion - Movado jan.1995

El la sekcioj kaj landoj

ALBANIO

PROPAGANDO DE ESPERANTO EN LA AMASKOMUNIKILOJ

La Albana Esperanto-Ligo festis sian kvarjariĝon la 9-an de marto 1995. S-ro Jaupi kaj s-ro Hasani, la estroj de la lokaj E-societoj „*Durres*" kaj „*Kukes*" regule aperigas informojn en la radioelsendoj pri la E-agado. La tutlanda instruista revuo „*MESUESI*" en decembro en du sinsekvaj numeroj publikigis artikolon verkitan de s-ro Bardhyl Mezini pri la valoro, neceso kaj instruado de la internacia lingvo. Simila artikolo emfazanta la aktualecon de Esperanto por la Eŭropa Unio aperis en la ĉiutaga ĵurnalo „*RILINDJA*". (Laŭ tiu artikolo oni ekfunkciigis korespondan kurson). Ankaŭ s-ro Beqiraj, la estro de la nova junulara E-organizaĵo (AUEJ) intervjuiĝis rekte en matena televidprogramo. Krome oni elsendis 30-minutan konversacion kun s-ro Vasil Pistoli, prezidanto de AEL kaj s-ro Bardhyl Mezini, estrarano de AEL kaj sekciestro de ILEI. Ili parolis pri la agado de AEL kaj pri la propeŭdetika valoro de E-o. La koncerna redakcio pretus elsendi ĉiusemajnan 30-minutan E-kursprogramon, se AEL disponus pri taŭga materialo. Eble *Mazi en Gondolando* povus esti bona komenco por tiu celo.

Informis: Bardhyl Mezini, estrarano de AEL por enlanda agado

Aŭstralio

Instruistoj kaj lernantoj flugis el ĉiuj aŭstraliaj ŝtatoj kaj ankaŭ el aliaj landoj por partopreni la *Somerlernejon*, okazintan inter la 9-a kaj 20-a de januaro en Adelaide. La lernejon en Adelaida kongresejo oficiale malfermis S-ro Rob Lucas, Sud-Aŭstralia ministro pri edukado. Aliaj parolantoj en la malferma ceremonio estis juĝisto Kep Endreby, prezidanto de la *Aŭstralia E-Asocio*, kiu parolis pri la Adelaida UK-97 kaj prof. Alan Bishop parolinta pri la projekto *Ekparoli* traktanta la propedeŭtikan valoron de Esperanto por angleparolantaj lernantoj de aziaj lingvoj en aŭstraliaj lernejoj. Fermante la ceremonion oni prezentis parton de la videa instruprogramo „Mazi en Gondolando". *Max Wearing* *(el Eventoj N.0071)*

Tri lernejoj de la regiono de Melbourne, ĉefurbo de ŝtato Victoria, komencis instruadon de Esperanto al naŭ- kaj dekjaraĝaj infanoj de la kvina kaj sesa klasoj. Ili atendas salutkartojn de aliaj lernejoj, kie estas instruata Esperanto. Eksterlandaj poŝtaĵoj multe instigus la infanojn kaj lerni la lingvon, kaj korespondi eksterlande por esplori diversajn kulturojn.

La ministerio pri edukado en Victoria devigas la elementajn lernejojn instrui lingvon alian ol la angla, kaj konsentis pri instruado de Esperanto.

Jen la adresoj de la tri lernejoj:

- S-ro D. Dulf, lernejestro, Clayton North Primary School, 1714 Dandenong road, Clayton, Victoria 3168, Aŭstralio

- S-ro Peter Bozes, lernejestro, Edithvale Primarz School, Edithvale road, Edithvale, Victoria 3196, Aŭstralio

S-ro Neil Cunnningham, lernejestro, Carrum Primarz School, Walkers road, Carrum, Victoria 3197, Aŭstralio

T.R. Bishop *(el Eventoj N.0075)*

Belorusio

PRI ORGANIZADO DE KORESPONDAJ KURSOJ

La ideo longe ŝvebis en la aero kaj realiĝis aŭtune de 1994. Du programistoj enkomputiligis provizore prilaboritan lernolibron pri Esperanto de *Aboljskaja*. Ni preparis vortaron kun ĉ. 3000 vortoj, krome ni verkis komputilan programon, kiu permesas uzi kaj tajpi literojn kun supersignoj. Ĉio ĉi ne signifis por ni grandajn elspezojn kaj ni ne devis anticipe havi plenan kompleton de la lecionoj por ĉiu lernonto. Precipe bone estas, ke ni povas intertempe korekti la lecionojn, se la lernantoj havas multe da demandoj pri la materialo.

Ĉio pretas, sed kiel ni havos lernantojn? La plej bona maniero ŝajnis esti disvastigi informojn per la gazetoj, kiuj havas sufiĉe grandan eldonkvanton. Ni provis tion. Venis nur du leteroj! Sed ni publikigis ampleksan artikolon ankaŭ en belorusa junulara gazeto „*Znamja Junosti*". Leteroj venas eĉ pli ol tri monatojn post la publikigo kaj preskaŭ ĉiuj niaj nunaj kursanoj eklernis Esperanton pro tiu artikolo.

Al ĉiu interesiĝanto ni sendas informleteron, en kiu ni iom rakontas pri Esperanto kaj klarigas la regulojn de la kursoj. La kursanoj ricevadas de unu ĝis tri lecionojn laŭ deziro. Post korekto de la kontroltaskoj, ni sendas la leterojn reen. Tiuj, kiuj bone solvas ĉiujn 25 taskojn, senpage ricevos vortaron. Krom tio ni informas la kursanojn pri la aĉeteblaj libroj kaj atingeblaj renkontiĝoj. Nia klubo baldaŭ aperigos E-revuon.

Nun ni havas 15 gelernantojn, kies aĝo estas de 16 ĝis 65 jaroj. Ili loĝas en la diversaj regionoj de Belorusio. La plej laborema inter ili jam plenumis la duonon de la kurso. Novaj lernantoj estas bonvenaj!

M.Ŝelestov, st. Sovetskaja 18-6, 222160 Ĵodino, Belorusio
E-Klubo „Verda Lumo", p.k. 124., 220116 Minsk-116, Belorusio

FRANCIO

INTERŜANĜO PRI INSTRUADO

I.P.I. organizas kvarfoje jare renkontiĝon de aktivuloj (ĉefe kursgvidantoj kaj animantoj de grupoj de la pariza regiono), kiuj deziras interŝanĝi ideojn por pli bone instrui kaj konservi lernantojn.

Ok aktivuloj ĉeestis la unuan renkontiĝon, kaj 17 la duan en novembro 1994. La tria renkontiĝo okazis la 14-an de januaro 1995. Vigla interŝanĝo de spertoj kaj informoj inter la ĉeestantoj riĉigis ĉiujn partoprenantojn. Multaj ludoj kaj dokumentoj (pli ol 50) estis prezentitaj. Ĉiu klarigis kiel li instruas (materialo,

tekniko, ekzercoj ktp...). Entute riĉigaj kunvenoj, tiel interesaj, ke estis decidite kunveni en ĉiu dua monato.

Se vi deziras partopreni kaj ricevi kolokvion, bonvolu skribi al:
Jean Marin, 9 rue Adrien Lejeune, F-93170 Bagnolet (Tel.:+33-43-638748)

CITAĴO EL LA 95JARA PROGRAMO DE *LA KVINPETALO*

„Julio 07-12. Lerni novan metodikon kun ĉarma instruistino? *Katalin Smidéliusz*, aŭtoro de specifa lingvokurso, IEI-kunlaborantino, trejnas vin plezure. Paralele Lucien Durandeu estos je dispono por pritraktadi la lingvon."

Post la pasintjara sukcesa metodika trejnado *La Kvinpetalo* denove okazigas staĝon por E-instruantoj.

F-86410 Bouresse, Route de Civaux, Francio *(el Literatura Foiro)*

GERMANIO

INTERLINGVISTIKO

La germana scienca *Societo pri interlingvistiko* (germana mallongigo „GIL"), sub gvido de **Detlev Blanke** okazigis de la 18-a ĝis la 20-a de novembro 1994 en Berlin sian 4-an jarkonferencon. Ligita al ĝi estis faka programo kun 14 prelegoj sub la kadra temo *esperantologio*, kiujn aŭskultis 35 personoj. GIL eldonas germanlingvan bultenon, kiu estas regule sendata i.a. al la plej gravaj germanaj bibliotekoj.

La germana profesiula scienca *Societo pri aplikata lingvistiko* (germana mallongigo „GAL"), unu el la du plej gravaj germanaj lingvistikaj organizaĵoj, same kiel en 1993 ankaŭ en 1994 enkadrigis prelegojn pri Esperanto. En la kadro de la 25a kongreso de GAL, 21-a ĝis 23-a de septembro 1994 en Trier, en la oficiala faka programo estis prelegoj de s-ino **Sabine Fiedler**, Leipzig (*Frazeologismoj en Esperanto*) kaj de d-ro Detlev Blanke, Berlin (*Pri specifaĵoj de tradukoj en Esperanto*). En vol. 27 de la serio *Forum Angewandte Linguistik*, eldonata de GAL, sub la titolo *Fachkommunikation* (faka komunikado), aperis kontribuoj de Sabine Fiedler *Lingvistikaj faktekstoj en la angla, germana kaj en Esperanto - interkultura komparo*, kaj de Detlev Blanke *Faka komunikado en planlingvoj*.

Ankaŭ tiuj ekzemploj montras plian fojon, ke kompetentaj lingvistoj-interlingvistoj kapablas eniri la fakprogramojn de lingvistikaj kongresoj, kiun eblon oni tro malofte utiligas.

Detlev Blanke *(Eventoj N.0071)*

HISPANIO

INTERUNIVERSITATAJ RILATOJ PER ESPERANTO

La universitata E-asocio „*Rosetta*" de Murcio, Hispanio informas, ke, kiel rezulto de iniciato de murciaj e-istoj, la *Universitata Instituto pri Ekonomiko de* Lodz (Polio) starigis plenajn rilatojn kun la *Fakultato pri Ekonomikaj Sciencoj de Murcio*. Por starigi la unuajn kontaktojn inter ambaŭ oficialaj institucioj vojaĝis

al Polio la dekano de la Murcia Fakultato. Estas kromrezulto, ke grupo da polaj studentoj vojaĝis januare-februare al Murcio.

Cetere, la dekano de la Murcia Fakultato deziras starigi similajn kontaktojn kun la Universitatoj de Pekino aŭ Tokio. Pliaj informoj kaj kontaktadreso:
Pedro Antonio M. Valverde, advokato, Av. Libertad, 6-2. E-30009 Murcia
(el Eventoj N.0074)

HUNGARIO

PROGRESO EN LA BUDAPEŜTA E-FAKO

La Esperanto-fako de la Universitato ELTE en Budapeŝto progresas malgraŭ la ĝenerala pli malfavora situacio de E-movado en Hungario. Ĝi havas rekordan nombron de studentoj: 20 komencantojn. En la fako studas 7 studentoj en la dua jaro, 4 en la tria kaj 4 en la lasta. Alvenis la tempo de denaskuloj: du Csiszár-filinoj kaj unu Golden-filo aliĝis al la E-fako. La kvaran jaron partoprenas du polaj gestudentoj. La pli vigla etoso speguliĝas ankaŭ en tio, ke la junuloj preskaŭ ĉiusemajne kolektiĝas ĉirkaŭ la „verda tablotuko" en kafejo por pridiskuti la verdan vivon.

La dua grupo de la internacia fako diligentas jam en sia kvara semestro. La 6 partoprenantoj venis el 6 diversaj landoj: Finnlando, Francio, Germanio, Israelo, Irano kaj Litovio.

(el Eventoj N.0073)

IRANO

ESPERANTO EN BORUĜERDO

Boruĝerdo estas unu el la plej antikvaj urboj de Irano kun pli ol 200 mil loĝantoj. En la urbo funkcias granda teksfabriko, kie oni organizis Esperanto kursojn kun la gvido de **S. Pakravan**. La lernantoj konsentis eklerni la internacian lingvon, eĉ uzi ĝin praktike en la fabriko. La fabriko pretas akcepti ofertojn el la tuta mondo. La gelernantoj jam scipovas paroli Esperante kaj ĝuas la korespondadon. Lastatempe multaj turistoj frekventas la urbon, la lokaj esperantistoj volonte akceptas ĉiujn samideanojn, kiuj deziras vojaĝi tien.

Informis: *S-ro Masud Gudarzy, No 38, Sh. Maleki Lane, Siavosh Str., Azadi Ave, IR-69188 Borujerd, Irano*

SVEDIO

ESPERANTO-FAKO EN LA KARLSKOGA POPOLA ALTLERNEJO

En la Esperanto-fako nun estas 18 gelernantoj el ses landoj: Danio, Finnlando, Norvegio, Rusio, Svedio kaj Tanzanio. Multaj studentoj lernas Esperanton en aliaj kursoj: Eŭropaj kursoj, vesperaj kaj someraj kursoj. (Lastjare sume estis 70 E-lernantoj.) Oni uzas la lernolibrojn kaj metodikon de **Lars Forsman**. Li havas lernolibrojn por komencantoj, progresantoj kaj por rapida lernado. Dufoje en la semajno ili lernas en lingvolaboratorio kaj havas specialajn lecionojn, kiam ili lernas kantojn kun **Andreo kaj Natasa Berce**.

La Esperanto-fako ekzistas ekde 1988. Ĝin partoprenis jam studantoj el pli ol 30 landoj. Ĉiun someron estis unusemajna internacia kurso. En 1990 la lernejo aranĝis la *Svedan Kongreson* kaj en 1991 la *Internacian Junularan Kongreson*. En 1995 oni planas organizi Esperanto-kurson por estontaj lingvo-instruistoj, kiuj antaŭe ne studis Esperanton. La Esperanto-fako havas propran pupteatron (reĝisoro **Anne Sofie Robinson**), kiu surscenigis jam multe da teatraĵoj. Ekzistas ankaŭ tripersona kantgrupo nomata „*Trifolio*" konsistanta el eksstudantinoj. Ili surbendigis sian kasedon en la Altlernejo.

En la lernejo estas ĉiuj kondiĉoj por lernado. Ĝi situas proksimume du kilometrojn sude de la urbocentro, ĉe la bela lago Möckeln kaj havas propran studentan urbeton. Ĉiuj studantoj loĝas en modernaj, apartaj ĉambroj kun propra duŝejo kaj necesejo. (La kuirejo kaj la televidaj ĉambroj estas komunaj). Ĝi havas ankaŭ grandan sporthalon kun saŭno kaj en la lerneja biblioteko estas multe da E-libroj.
(Pri aliaj detaloj vidu la 94/3-an numeron de IPR. La Red.)

Informis: la studentoj de la Karlskoga Popola Altlernejo

SVISLANDO

LA CHAUX-DE-FONDS

„Aŭgusto 02-07 Aymonier, Bovet, Cseh ... Gacond!

La perfektiĝo pri metodiko de la esperanto-instruado interesos tre varian publikon: instruantoj dezirantaj progresi, komencantoj lernemaj, infanoj kaj plenkreskuloj. Ĝuste en minisocieto, kiu spegulas la variecon de Esperantio, oni povas reale trejniĝi al instruteknikoj aŭdvida, perbilda, strukturŝanĝa, ludiga, dramiga kaj kantiga. Kun metodologo kaj pedagogo kia Claude Gacond."

CP 779, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, Svislando *(el Literatura Foiro)*

USONO

SOMERA UNIVERSITATO EN USONO

Someraj Kursoj ĉe *San Francisca Ŝtata Universitato* okazos de 26-a de junio ĝis 14-a de julio 1995.

Festo de la *50-a Datreveno de la Unuiĝinta Naciaro* komenciĝos samtempe kun la E-kursoj la 26-an de junio. Partoprenos multaj gravuloj de SFSU. Kongresos tie ankaŭ *Mondfederalistoj* kaj aliaj organizaĵoj.

Kosto por la kursoj estas 345 USD por 3 semajnoj.

Loĝado: 450-650 USD, depende de ĉambrokategorio, por 3 semajnoj, kun 3 manĝoj tage.

Eksterlandaj kursanoj estas aparte bonvenaj. Krom la studado evidente okazos ekskursoj, distra programo, prelegoj, kantfestoj ktp.

Se la afero kaptis vian atenton, ne hezitu skribi al: *S-ino Cathy Shulze, 410 Darrel Road, Hillsborough, CA-94010, USA, Tel.:+1-415-3421796*

LA 10-AJ ESPERANTAJ PEDAGOGIAJ TAGOJ

(landa lingvopedagogia konferenco)

La konferenco okazis inter la 25-a kaj 26-a de februaro 1995 en Budapeŝto. Ĝin partoprenis ĉ. 60 hungaraj esperantistoj. Gastoj venis ankaŭ el Argentino, Germanio, Jugoslavio, Kroatio, Rumanio, Rusio kaj Slovakio. Anstataŭ arbitra ĵurnalista resumado, mi raportos pri ĝi paŝo post paŝo, en kronologia vicordo.

MALFERMO

Post la komuna kantado de nia himno, s-ino **Zsuzsa Barcsay**, estrara komisiito de ILEI salutis la ĉeestantojn. Poste ni omaĝis al niaj lastjare forpasintaj kolegoj, inter ili al s-ro Alfonz Pechan, redaktoro de la hungara Esperanto-vortaro. La unua tago estis memortago omaĝe al Andreo Cseh. La memortagon iniciatis s-ino **Katalin Smidéliusz** dum la pasintjara konferenco. (Pri Andreo Cseh kaj lia metodo ni povis legi en la 94/1-2-a numero de IPR, en la nuna raporto mi klopodos ne ripeti tiujn informojn.) Krom la ĉeftemo ni povis ĝui la ekspozicion de *Literatura Foiro* kaj la tagon fermis la asembleo de la hungara ILEI-sekcio.

FESTPAROLADO

Ni povis aŭskulti la personajn memorojn de **Éva Farkas-Tatár**, kiu mem estas Cseh-instruisto. (Krom ŝi en Hungario estas nur du aliaj diplomitaj Cseh-instruistoj, nome d-ro Ferenc Jáki kaj s-ino Katalin Smidéliusz, tutmonde estas ĉ. 30.) Ŝi partoprenis la UK-on en Kopenhago 1962. Laŭ ŝi, bona instruisto de Esperanto estas kvazaŭ pastro. Ni devas elaste instrui, t.e. se la lernantoj ankoraŭ ne estas pretaj akcepti ion, ni provizore rezignu pri la afero. Se la lernantoj estas freŝaj ni instruu pli, se ili estas lacaj, ni instruu mapli ol planite. Ne la instruisto estu la grava, oni ne devas miri pri niaj kapabloj. Ni devas veki en la homoj la senton: "*jen, mi scias ankaŭ tion.*" Per tio ni povas feliĉigi la homojn kaj tio gravas. Tiu tasko estas iom astreca. Unu el la konsiloj de Cseh diras, ke *ĉiuj konsiloj estas superfluaj, se nian laboron vivigas amo al Esperanto kaj al la gelernantoj.*

NOVAJ ESPLOROJ PRI CSEH

Siajn lastajn jarojn Andreo Cseh devis pasigi en hejmo de maljunuloj. Kvankam onidire li estis tre kolektema homo, dum la translokiĝo granda parto de la postrestaĵoj pereis. Dank' al Katalin Smidéliusz, el la restantaj memoraĵoj ni povis vidi unikan ekspozicion dum nia konferenco. En la *Internacia Esperanto Instituto* ŝi partoprenas la esploradon de la postrestaĵoj. Tiom pli, ĉar inter tiuj aĵoj malgranda parto estas hungarlingva. Interalie oni retrovis du skatolojn en IEI kun Cseh-korespondado. Ni povis trafoliumi lian memorlibron, kiu enhavas

gepatran vojprovizon kaj amikajn leterojn el la jaroj 1918-1920. Estas aparte kortuŝa lia korespondado el 1933, kiam lia patrino grave malsaniĝis kaj fine mortis. Ottó Cseh, lia patro, tiam restis sola, ĉar Andreo ne havis gefratojn. Ĉefe pro financaj kialoj la filo ne povis partopreni la entombigon. El la prelego de Katalin ni eksciis multe da informoj pri Andreo Cseh, kiuj ĝis nun ne estis publikigitaj. Estas grave, ke oni kolektu tiujn informojn en biografion, antaŭ ol pereus eĉ tio, kio restis. Aŭtune, okaze de la datreveno aperos memorlibro en la redaktado de K. Smidéliusz omaĝe al Cseh, surbaze de la trovitaj materialoj. Kontribuos pluraj granduloj de nia movado: *Boulton, Charters, MacGill, Roelofs, Tonkin k.a.*

Seminario pri la Cseh-metodo

Post tiu ĉi historia parto sekvis la prezentado de la metodo fare de s-ino Smidéliusz kaj s-ro **Atilio Rojas** el Argentino. Ili praktike prezentis al ni tiujn principojn, kaj karakterizajn trajtojn, pri kiuj vi povis legi en la menciita IPR-numero. Ni vidis, kiel funkcias la teknikeroj en la praktiko. Tiun tagparton finis prezentado de la Cseh-instruhelpiloj el la kolekto de la ĉeestantaj instruistoj. Post ilia prezentado analizis la metodon **Stefan MacGill**, kaj lin sekvis multaj aliaj ĉeestantoj.

Stefan MacGill: "Cseh estis ne nur teoristo, sed praktikisto, kaj en sia tempo li estis tre avangarda. Lia metodo estas cellingva, kio tiutempe tute ne estis kutima. La metodo estas konversaciiga, kaj tiel la nocioj ligiĝas rekte al la ideoj. Pro tio superfluas komence multaj gramatikaĵoj. Mem la metodo estas zorge elpensita kaj bone ordigita. (El tiu vidpunkto ĝi estas la plej ellaborita sistemo ĝis nun en Esperantio.) Ĝia malavantaĝo, ke ĝi celas ne rekte la komunikadon, sed la nuran priskribon de la (nereala) mondo. Ĝi ne estas verbocentra kaj la korusan ripetadon nuntempe oni ĝenerale ne uzas en la diversaj metodoj. La plej bona omaĝo estu al Andreo Cseh, ke ni estu same avangardaj, kiel li estis tiutempe. Tio signifas, ke ni transprenu el la Cseh-metodo kaj el la aliaj metodoj la bonajn elementojn."

Atilio Rojas: "Estas tre grave, ke oni organizu laborgrupojn dum la lernado."

Katalin Smidéliusz: "La celo de la seminario estas prezenti la puran metodon. Sed ni ne deziru havi unusolan metodon, ni kolektu ĉiujn trukojn, kiujn ni povos poste apliki."

Jozefo Horváth: "En la fiŝ-kursoj unue ni uzas Cseh-metodon, poste ni instruas la tutan gramatikon kaj la tria ŝtupo denove estas Cseh-metodo, sed jam iom alie. Oni povas multe pli rapide uzi Cseh-metodon, se unue oni instruas la gramatikon."

Katalin Smidéliusz: "Tio ne eblas. La tria ŝtupo de Jozefo Horváth uzas rektan metodon, sed ne Cseh-metodon. Ni ne miksu la nociojn, kvankam la Cseh-metodo baziĝas sur la rekta metodo, ĝi havas tamen specifajn trajtojn."

Atilio Rojas: "Unue ni devas informiĝi pri la lernantaro. Antaŭ la Cseh-kursoj oni plenigas enketilojn. Krome ni devas iom studi la lingvon de la kursanoj. Informiĝi pri ilia prononco, pri la mankantaj fonemoj, ĉu la verbo gravas en ilia lingvo ktp."

Blazio Vaha: "La prelego de Katalin pri la historio de la metodo fortigas nian komunumon. Por ricevi realan bildon pri Cseh, ni devas trovi por la temo historiistojn, kiuj venas el ekster nia komunumo. Mia demando: ĉu uzante la metodon oni postulas kompletajn respondojn aŭ akceptas ankaŭ elipsajn frazojn?"

Atilio Rojas: "Unue ni petas kompletajn respondojn, poste sufiĉas elipsaj frazoj."

Péter Rados: "Estas problemo de la metodo, ke kun parto de gramatiko oni ne povas paroli."

Katalin Smidéliusz: "Nuntempe oni preferas alilandajn instruantojn en la kursoj, sed alilanda instruisto ne kapablas komence instrui la tutan gramatikon."

Asembleo de la hungara ILEI sekcio

S-ino **Márta Kovács** raportis pri la agado de la sekcio en la pasintaj kvar jaroj. Fininte sian raporton ŝi informis la anaron, ke pro diversaj familiaj premoj ŝi ne plu povas estri la sekcion. Do sekvis la redivido de la taskoj ene de la sekcio. Pri la membraro kaj ekspedo de IPR zorgos s-ro **László Gados**, pri la subvencioj f-ino **Erika Tóth**, pri la perado de Juna Amiko f-ino **Mónika Molnár**, pri la organizo de Pedagogiaj Tagoj s-ino **Zsuzsa Barcsay**. Fine ni ne sukcesis elekti novan sekciestron, la sekciestro provizore restas s-ino **Kovács**.

Dimanĉe

Ni komencis la tagon kun medita horkvarono gvidita de s-ino **Éva Farkas-Tatár**. Poste ni partoprenis publikan lecionon de **Karolina Kocsi Sződy** el urbo Veszprém. La lernantaron formis grupo de mezlernejanoj, partoprenantoj de la paralele funkcianta *SOJLO*. Ni povis rigardi ankaŭ la provlecionon de la *Mazi*-serio. S-ro **Stefan MacGill** raportis pri ĝia preparado kaj ni analizis la materialon. La kolegoj, inter ili ekzemple d-ro **Vaha**, havis plurajn proponojn por la eventualaj ŝanĝoj. Ni esperu, ke niaj proponoj alvenos ĝustatempe kaj bonvene.

József Németh

Internaciaj kontaktoj

GERMANAJ ESPERANTISTOJ EN HUNGARIO

Antaŭ nelonge vizitis la *bazlernejon Nagy László* en urbo *Pápa* (Hungario) la **geedzoj *Rössler*** el Germanio. Ili rigardis la Esperanto-instruhoron de *József Németh*, gvidis la Esperanto-fakrondon de s-ino *Edit Kovács* kaj interkonatiĝis kun la nova direktoro de nia lernejo, kun s-ro *Róbert Rádi*. Franz kaj Rita Rössler vivas en sudokcidenta Germanio, ili

ambaŭ estas muzikinstruistoj. Franz ankaŭ komponas, skulptas, tradukas, skribas sciencajn kaj literaturajn verkojn, ŝi aldone desegnas kaj pentras. Aperis iliaj libroj, estis ekspozicioj kaj koncertoj kun iliaj verkoj.

Eble ne estas tute hazarde, ke vi jam plurfoje venis al Hungario? Kian kontakton vi havas kun nia lando?
Nia interesiĝo pri Hungarujo jam fontas en niaj fruaj jaroj, kiam ni studis pianon pere de la Bartók-a "*Mikrokosmos*". Tiutempe por ni la vorto "*Gyermekeknek*" („Por infanoj", titolo de pianokajero) ankoraŭ estis fabela kaj sekretoplena. Tiam ni forte ekŝatis la hungaran muzikon. La aktualaj kontaktoj ekestis pro kaj pere de Esperanto. Ni instruis en 1992 en Bratislavo muzikon en la unua feria *Esperanto-gimnazio de ILEI*. Tie lernis ankaŭ hungaraj geknaboj. Vizitante ilin la postan jaron, ni venis ankaŭ al Pápa. La kontaktoj kun la lando firmiĝis kaj vastiĝis.

Ĉu vi venas nur turismi aŭ viaj vojaĝoj havas ankaŭ aliajn, eble fakajn celojn?
Intertempe ni havas plurajn konatojn kaj amikojn en Hungario. Por viziti ilin, sed ankaŭ por lerni la lingvon, por pli bone konatiĝi kun la geografio, homoj kaj kulturo de la lando ni jam plurfoje revenis. Laste ni en Pápa produktigis du el niaj libroj, ĉar ni aprezas la hungaran talenton kaj sperton en ĉi tiu kampo. Dum nia vizito ni povis priparoli ankaŭ venontajn ekspoziciojn de niaj verkoj en Pápa kaj en almenaŭ du aliaj hungaraj urboj.
[La ekspozicioj en Pápa okazis en aprilo 1995. *Noto de la Red.*]

Kial vi eklernis la hungaran? Kia estas nia lingvo per la okuloj de alilingvano?
Kiam ni ie vojaĝas, ni provas lerni almenaŭ iomete la regionan lingvon por povi kontakti ankaŭ homojn, kiuj ne havas eblecojn lerni iun fremdan lingvon. Rilate la hungaran aldoniĝas la intereso penetri en sufiĉe fremdan lingvosistemon, la emo venki tiun antaŭe ŝajne ne supereblan limon. Kvankam la hungara estas por ni malfacila, sed ĝi evidentiĝis pli logika ol antaŭvidite kaj oftaj respegulaj formoj kun la germana multe helpas.

Oni povas sufiĉe facile komuniki en Eŭropo per via gepatra lingvo. Tamen vi eklernis Esperanton. Kial? Kion signifas por vi la internacia lingvo?
Ni sufiĉe hazarde kaj malfrue trafis Esperanton, tamen rapide ellernis ĝin kaj baldaŭ estis konvinkitaj kaj pri la lingva sistemo kaj pri ĝia komunika valoro. Malgraŭ nia vasta lingva bazo (humanismaj, ĝermanaj kaj latinidaj lingvoj) ni antaŭe nur tre malofte havis kontentigajn, rektajn kontaktojn kun alilingvanoj. Nur Esperanto ebligis transponti la lingvajn kaj kulturajn obstaklojn, ĝi estas pli intima komunikilo ol iu ajn alia, tamen ĉiam fremda lingvo. Nun ni havas kontaktojn kun multaj diversaj lokoj en la mondo, kio vastigas niajn sciojn kaj kontribuas al pli bona interkompreniĝo inter anoj de diversaj popoloj.

Mi scias, ke vi konsideras tre grava la lernejan instruadon de Esperanto.
Jes, se ĉiu junulo en la mondo en la lernejo studus Esperanton, tio multan tempon povus ŝpari. Nacia lingvo nur post longega tempo kaj nur esceptokaze estas ellernebla. Sed pere de Esperanto oni havus post akceptebla tempo komunan lingvan bazon (kiun ĉiu devus lerni, ne nur la lingvaj "minoritatoj"!), kiu ebligus samrajtajn kontaktojn inter la diversaj lingvaj komunumoj. Pro tio ni admiras la hungaran lernejan sistemon, kiu ebligas la lernadon de Esperanto en certa kadro de la oficiala lecionaro. Ni esperas, ke via lando en ĉi tiu rilato daŭrigos sian modelan funkcion kaj ne cedos al eksteraj premoj.

Kion vi opinias pri la granda antaŭmarŝado de la angla en la mondo?
La angla lingvo estas - kiel ankaŭ ĉiu alia - interesa kulturlingvo. Sed ĝi estas maltaŭga kiel internacia helplingvo. Unue, ĝi estas tro komplika (oni pensu nur pri la ortografio kaj prononcado). Due, ĝi estas nacia lingvo, kiu ŝparas al la anglalingvanoj ĉian lernadon de fremdaj lingvoj. Trie, ĝi estas okupa lingvo, kiu akre sentigas la potencorilatojn en la nuna tempo. (Antaŭe angla koloniismo, nun usona mondregado post la dua mondmilito. Pri la komparebla iama funkcio de la rusa en via lando ja oni ne devas paroli.) Kvare, ĝi baras preskaŭ ĉian intereson por aliaj lingvoj kaj kulturoj. Kvine, la kulturo aŭ malkulturo ligita kun la usona-angla lingvo detruas la apartajn trajtojn de aliaj gentoj aŭ popoloj. Ni esperas, ke la hungaroj pli prudente konservos siajn apartaĵojn kaj ne tiom facile subigos sin al tiaj influoj kiel aliaj mondregionoj, ekzemple ankaŭ la nia. Kontraste Esperanto ebligas egalrajtan komunikadon, respektante kaj tiel konservante la individuecon de homoj kaj homaj grupoj, malhelpante unuforman formikecan estontecon.

Kiuj estas la kaŭzoj, pro kiuj Esperanto ne povis ĝis nun tiom multe disvastiĝi, kiom Zamenhof antaŭ pli ol jarcento imagis?
La precipaj obstakloj estas jenaj: Nek la unuopaj homoj, nek la politikistoj konas la avantaĝojn de Esperanto. Se ili spertus (kiel ni) kiaj kontaktoj post nur jarduona lernado de Esperanto estas eblaj, ili tuj konvinkite voĉdonus por Esperanto; ĉiu senkona antaŭjuĝo malaperus. Alia problemo estas, ke la regantaj elitoj havas la eblecon lerni grandajn naciajn lingvojn, nun ili eluzas propraprofite siajn tiajn kontaktojn kaj ne volas perdi siajn privilegiojn. Certe ankaŭ la "moderna vivo" ŝajne konkretiĝinta pere de la angla lingvo logas multajn. Ankaŭ la emo simple sekvi senpripense la fluojn de la historio malhelpas la rapidan enkondukon de Esperanto. Kaj monda socio, kiu ne kapablas venki ekz. la daŭran mortadon de infanoj pro malsato, certe same ne havas la moralan instigon starigi justan lingvosistemon en la mondo.

József Németh

POST LA SENPAGA KORESPONDA KURSO

Antaŭ 15 jaroj mi eldonis en Britio la unuan senpagan korespondan kurson, kaj mi mem korektis lecionojn de pli ol 300 lernantoj dum malpli ol unu jaro (unu tagon venis eĉ 17 lecionoj samtempe, kaj oni interesiĝis pri la projekto el 18 landoj). Sed kio okazis post la 10-a leciono? Kelkaj el la kursanoj ĉeestis asociajn kunvenojn, kie ili aŭdis:„Ni uzos la nacian lingvon, ĉar estas unu/du komencantoj inter", aŭ ili komprenis nenion, ĉar sperta esperantisto tro rapide parolis pri malfacila temo. Nur manpleno el ili restis en la E-movado.

Ĉisomere mi faris mian okan viziton al *Gresillon*, kaj tie mi festis la 30an datrevenon de mia geedziĝo kun franca instruistino, kiun mi renkontis tie. La feston ĉeestis 50 samideanoj el 8 landoj, kaj inter ili estis brita geedza paro, kiu dum multaj jaroj laboregis en la E-movado, sed dum la lastaj dek jaroj trovis alian flankokupon, ĉar ili ne plu kredis en la sukcesa estonteco de la E-movado. Post kelkaj tagoj en *Gresillon* la brita paro diris: „*Jen estas la vera Esperantujo*!"

Do, jen taŭga celo por anoj de korespondaj kursoj, ĝi bezonas nur bonan propagandon fare de la naciaj movadoj. Oni vizitu la kastelon Gresillon, en la *Loire-valo* por renkonti kursanojn el diversaj landoj kun simila lingvo-nivelo.

Les Hartridge, 74 Devonshire way, Croydon, Anglio CRO 8BS

Kulturaj aranĝoj en Grésillon en 1995

22.06-07.07. 1-a nivela kaj 2-a nivela kursoj, manaktivaĵoj, komunaj promenadoj, distraj vesperoj.

08-22.07. Trianivelaj kursoj: la unua-nivela kaj la trianivela kursoj daŭros du semajnojn. La unua semajno de la duanivela kurso konsistos el aktivigo aŭ reaktivigo de la konoj kaj la dua semajno el praktika konversaciado. Okazos prelegoj pri la 100 jara datreveno de la invento de la kinoarto kaj pri la influo de la mondmilito al la E-movado.

23.07-05.08. Tri diversnivelaj kursoj. **Georges Lagrange** gvidos semajnon pri la „arto traduki". **Kimie Markarian** proponis organizi „*Japanan Semajnon*".

08-19.08. Tri diversnivelaj kursoj. Unu semajno estos dediĉita al „*praktika pedagogio*".

19-31.08. Kursoj kaj diversaj aktivaĵoj. Eblas organizi ekskurson al la multaj regionaj vidindaĵoj laŭ la elekto de la ĉeestantoj. Libro-bindado, korbofarado kaj aliaj metiaj laboroj estas antaŭviditaj. Nia libroservo disponigas al la ĉeestantoj la necesan materialon por studi kaj lerni. Vi rajtas jam peti la katalogon. Fine de ĉiu periodo estas eblo organizi ekzamen-sesion. Kandidatoj sin anoncu. Konfirmo de rezervado nur kontraŭ poŝtmarko aŭ respondkupono.

Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj,
Kastelo Grésillon, F-49150 Baugé, Francio, Tel: 41891034

INTERNACIA TAGO DE INFANAJ RAJTOJ

Ĉirkaŭ la plej granda Bangkoka stacidomo kolektiĝas ĉiutage sennombraj infanoj orfe vagantaj surstrate. Kelfoje ilin atendas parencoj, sed pli ofte klopodas ruzmetode kaptserĉi ilin la t.n. „laborperantoj", kiuj enretigas ĝuste la plej ĉarmajn knabinojn kaj la plej energiajn knabojn, kaj kutime „afable" ofertas tujan tranoktejon.

Du el tiuj viktimoj deksep- kaj deknaŭjaraj gastis en Nederlando por rakonti siajn nekredeblajn vivhistoriojn. Al la knabino oni promesis tre bone pagatan laboron kiel „servistino" (eŭfemisme por prostituitino), al kiu „servado" oni minace kaj skurĝe devigis ŝin. La junulo devis sklave kaj multhore labori sub plej teruraj kondiĉoj en fabrikoj. La geknabojn invitis *CHILDRIGHT WORLDWIDE*, organizo - (ĝin fondis la ĵus mortinta nederlanda nobelpremiito D-ro **Johano Tinbergen**) - fortege batalanta kontraŭ ĉiaj formoj de infaneksploatado. Bedaŭrindege, unu el la plej komplikaj problemoj estas la korupta sinteno de politikistoj kaj publikaj instancoj, kiuj facile akceptas monon kaj interŝanĝe firme fermas la okulojn.

La 20-a de novembro jam fariĝis la *Internacia Tago de Infanaj Rajtoj*. Ĝin ĉefmotore subtenas *Amnestio Internacia*, ĝuste en tiu tago iniciatinta kampanjon, kiu celas advokati infanojn, kiuj fariĝas viktimoj de kaptiteco, turmentadoj, perfortoj, politikaj murdoj, malaperigoj kaj mortpuno. Membroj de ĉi tiu organizo baldaŭ skribos amase leterojn al registaroj de tiuj landoj, en kiuj infanaj rajtoj estas malrespektataj. Ankaŭ la usona registaro sekve povos atendi multege da protestskribaĵoj, ĉar en Teksaso dubmotive mortkondamniĝis *Robert Carter* pro murdo, kiun li estus farinta en la 17-a jaraĝo.

Esperantistoj, kial ni ne amase reagu, skribante prefere en la „bona lingvo" al: *MONDMOVADO POR INFANAJ RAJTOJ, VONDELSTRAAT* 120, NL-1054 GS *AMSTERDAM.* Peranto en Nederlando: *JACQUES TUINDER, HENEGOUWENLAAN 35, 1966 RH HEEMSKERK*

Por via notlibro

RONDO FAMILIA

En la lastaj monatoj *Rondo Familia,* la nova organizaĵo por esperantistaj familioj, sukcesis laŭgrade solvi siajn komencajn ekzisto-problemojn.

Nun ĝi ekrigardas al la estonteco.

Ni serĉas membrojn. Se vi estas esperantista familio (prefere uzata Esperanton hejme almenaŭ dum parto de la tempo, almenaŭ kun parto de la familianoj)

anoncu vin! Ni registros vin kaj vi ricevos senpage la kunligan bultenon „*Cirkulaĵo*". Ne ekzistas membrokotizoj pagendaj, oni nur esprimu la deziron eniri la rondon.

Se vi havas energion kaj ideojn kaj volas labori por *Rondo Familia*, anoncu vin kiel kandidaton por la estraro de *Rondo Familia*. La elektoj okazos perpoŝte dum la venonta somero.

Ni bezonas estraranojn kun sperto pri la movado (tre taŭgas eksaj TEJO-funkciuloj) kaj kun intereso pri Esperanto en la ĉiutaga vivo.

La adreso de *Rondo Familia* estas ĉe: *UEA, Nieuwe Binnenweg, 176, NL-3015, Rotterdam, Nederlando, E-poŝto: uea@wammes.erc.eur.nl*

RENKONTIĜO DE E-FAMILIOJ

La 17-a REF okazos inter 5-12 de aŭgusto en Tata, Hungario, ĉarma, pitoreska eturbo kun monteta ĉirkaŭaĵo 80 km-ojn de Budapeŝto.

REF-ejo: junulara kampadejo kun 4- kaj 6-litaj ĉambroj sur la bordo de lago. La programeroj estos flekseblaj, dependantaj de la bezonoj kaj la vetero: komuna ludado, kantado, naĝado. Samloke kaj preskaŭ samtempe (8-15.07.95) okazos *Internacia Junulara Semajno* kaj *Mezeŭropa Junulara Semajno*, do estos ankaŭ komunaj programeroj.

Kotizoj (inkl. la tranoktadon, trifojan manĝon tage kaj programkostojn): por „A"-landoj: 120-170 DEM, por „B"-landoj: 6000-8000 HUF.

Ni atendas la Esperante parolantajn familiojn, parojn kaj tiujn unuopulojn, kiuj volonte okupiĝas pri infanoj kaj pretas organizi kaj partopreni programerojn. Pliaj informoj, aliĝoj ĉe:

Anna Besenyei, Szerémi út 21. IV/20, H-1117 Budapeŝto
Tel.: +36-1-626440

HEROLDO DE ESPERANTO

La printempa duobla numero de *Heroldo de Esperanto* enhavas detalan liston de ĉiuj plej gravaj feriaj renkontiĝoj, seminarioj, internaciaj kursoj, kunvenoj kaj kongresoj, kiuj okazas en Esperanto ĉie en la mondo.

La listo por 1995 detaligas datojn, adresojn kaj programojn kaj nombras **pli ol 200 aranĝojn**. Oni povas senpage ricevi la supre menciitan numeron, mendante ĝin ĉe la redakcio (*Via Sandre 15, I-10078 Venaria Reale, Italio*). Kiel konate, *Heroldo de Esperanto*, fondita en 1920 estas la plej populara gazeto en la Internacia Lingvo kaj estas eldonata de laŭleĝe registrita kultura socieo sen profita celo.

A. Fighiera-Sikorska, redaktorino

ĈU VI AŬDIS?

Antaŭnelonge aperis la dua eldono de la instrukompleto „*Ĉu vi aŭdis, ke...*" verkita de Katalin Smidéliusz.

La instru-kompleto enhavas tekstojn de mezgrada lingvonivelo por evoluigi kaj kontroli la komprenon de 25 E-storioj, aŭdeblaj sur la akompana kasedo.

La kompleto aĉeteblas en E-libroservoj, en Hungario ili troveblas ankaŭ en la plej grandaj librovendejoj. La kasedo kaj la libro mendeblas ankaŭ ĉe la aŭtorino, kontraŭ 26 NLG aŭ por ekssocialismaj landoj kontraŭ 550 forintoj (inkluzive la sendokostojn):

Katalin Smidéliusz, H-9700 Szombathely, Apáczai sétány 10.

KOMPUTILA MATEMATIKA INSTRUPROGRAMO

Ĉiuj, kiuj havas bazlernejan infanon, konscias pri la neceso de multa ekzercado de matematikaj operacioj. Por parkerigi la bazajn operaciojn, la multiplikan tabelon ktp. tre oportunas komputila programo. La eldonejo *Peranto* aperigis tian instruprogramon sub la nomo *Kalkulo* bazitan sur Esperanto.

La programo konsistas el du partoj - ekzerca kaj kontrola, kaj scipovas proponi taskojn en 5 elekteblaj niveloj, por lernantoj de (elekteblaj) 1-4 klasoj de elementa lernejo. Per ĝi estas ekzerceblaj la operacioj adicio, subtraho, multipliko, divido kaj kelkaj bazaj frakciaj operacioj. Oni povas difini ankaŭ la kvanton de demandoj, kaj povas savi kaj kompari la diverstagajn rezultojn.

La kontrola parto de la programo pritaksas la respondojn, mezuras la tempon elspezitan por la solvado, kvocienton de la ĝustaj respondoj, kuraĝigas solvantojn.

La klare aranĝita menu-sistemo ebligas la tujan komprenadon de la programfunkciado ankaŭ por komputile komencantoj. *Kalkulo* senprobleme ludiĝas (ja la infanoj konsideras ĝin kiel ludo...) en ajna IBM-kongrua komputilo (de XT ĝis *Pentium*) kun ajna monitora sistemo. Ĝi povas esti utiligata ankaŭ de neesperantistoj, ja la respondendaj taskoj estas komprenataj de ĉiu (ekz. 9*8=72 en ĉiu lingvo...)

La programo sur disko (5, 1/4 kaj 3, 1/2) estas mendebla kontraŭ nur 950 HUF (8 $) ĉe la eldonanto:

Peranto Bt, Budapeŝto, H-1136, Tátra u. 4.

RETAJ KURSOJ

Laŭ informo de **Derk Ederveen** en *TEJO Tutmonde (1/1994)*, nun ekzistas tri enkondukaj korespondaj Esperanto-kursoj en elektronika formo ĉe komputilaj retoj en la angla, franca kaj germana.

Entute aliĝis dum du kaj duono jaroj pli ol 1.000 komencantoj! Laŭ TT ili povas daŭrigi la lernadon per elektronika versio de la kurso *Gerda malaperis* de Claude Piron.

Por pliaj informoj turnu vin al: *Derk Ederveen, Fidonet: 2:283/327.7*
Internet: derk@saluton.hacktic.nl

(La rubrikon mi kompilis uzante la artikolojn de Eventoj. La Red.)


Postparolo de la nova redaktoro

Skribante la postparolon mi jam konas la decidon de la internacia ILEI-estraro, oni akceptis min kiel redaktoron de IPR. (La informo venis unu tagon post la finredaktado: por rekapti la aperritmon de la revuo, mi frue eklaboris.)

En marto mi dissendis kelkajn leterojn, dekduon de aŭtorekzempleroj el la lastaj du jaroj petante kunlabori la iamajn kontribuantojn de la revuo kaj kompletigis mian komputilan sistemon.

Jam alvenis la unuaj leteroj kaj materialoj. Kelkajn artikolojn mi ricevis de *István Ertl* kaj kelkajn aliajn mi rajtis represi el Eventoj dank' al *László Szilvási*. Tamen ĉe la unua numero mi ankoraŭ ne havis eblon elekti inter multaj materialoj, do la unua numero ne tute respegulas mian redaktan koncepton.

Mi volas, ke IPR estu pli praktika, pli varia kaj ĝi neniam plu perdu la aperritmon. Momente ne estus oportune starigi formalan redakcion. Mi proponis/as/os kunlaboron al pluraj kolegoj. Post iom da tempo ni vidos, kiuj personoj volas kaj kapablas daŭre kunredakti la revuon. Ĝis ni ekhavos kompletan redakcion, mi ĉiam aparte listigos la nomojn de la „kunredaktintoj" de la aktuala numero.



Katalin Smidéliusz, nia vicredaktisto, estas atingebla ankaŭ tra komputilreto (escepte julion kaj aŭguston). Ŝia adreso: smidik@fs2.bdtf.hu.

Stefan MacGill informis min, ke li mallonge prezentas min en la 94/4-a numero. Por eviti duoblaĵojn, nun mi ne skribas pri mi mem. Anstataŭ aŭtobiografio - ĉar multaj certe ne konas min - staru ĉi tie mia kalviĝanta kapo.

SEKCIESTROJ de la LIGO

Albanio: Bardhyl Mezini, Rr. Maliq Muco, Pall. 50, ap. 3, Tirana.
Argentino: Herminia Kirkerup de Fernandez, Calle Cerrito 1249, Barrio San Martín, AR-5000 Córdoba, (Córdoba).
Aŭstrio: Mag. Walter Klag, Rudolfinergasse 8/11, AT-1190 Wien.
Belgio: Raymond. Wylleman, A. Vermeylenstr. 65, BE-8400 Oostende.
Brazilo: Elvira Fontes, Rua Machado de Assis 243, ap. 11, BR-04106 Sao Paulo (SP).
Britio: Arnold Pitt, Yew Tree Cottage, Ivington Road, Leominster, Herefordshire HR6 8QD.
Bulgario: Kiril Velkov, D. Todorov 9, BG-3000 Vraca.
Ĉeĥio: Miroslav Malovec, Bosonozská 15/10, CZ-625 00 Brno.
Ĉinio: Zhang Danchen, General Foreign Languages Dept., 29-34 North Part, Huazhong Normal University, CN-430070 Wuhan.
Estonio: Eve Otsa, Liivalaia 30-12, EE-0001 Tallinn.
Finnlando: Synnöve Mynttinen, Keskussairaalankatu 5 M 133, FI-15850 Lahti.
Francio: S-ino F. Drouard, Chalet Denali, Chemin de Thural, FR-74920 Combloux.
Germanio: Michael J. Scherm, Von Thürheimstr. 47, DE-89264 Weissenhorn.
Hispanio: Manuel López Hernández, Poŝtkesto 832, ES-41080 Sevilla.
Hungario: Kovács Márta, Ady E. u. 23-25/C, HU-1221 Budapest.
Israelo: Murjan Josef, P.K. 1289, IL-61012 Tel-Aviv.
Italio: Catina Dazzini, C.P. 22, IT-54100 Massa.
Japanio: *vakas kaj konsideru sin forstrekita.*
Koreio: So Ĵin Su, Dept. de Ekonomiko, Universitato Kangnam, Kugali Kihung-up, Yongin-gun, Kyonggi-do 499-900.
Kroatio: Ivan Bekavač-Basić, Kušlanova 59. HR-41000 Zagreb.
Kubo: H. Jiminéz, Vista Alegre 254 e/J.B. Zayas y Luz , Caballero, Vibroa, CU-11500 C. Habana.
Nederlando: Hans ten Hagen, Middenweg 587, NL- 1704 BH Heerhugowaard.
Nordameriko: Doroteo Holland, 5140 San Lorenzo Dr., Santa Barbara, CA 93111-2521, Usono.
Norvegio: Björn Thuv, Aröyveien 33, N-3135 Torod.
Pollando: p/a Silezia Esperanto-Asocio, ul. Dubois 3, PL-50-952 Wroclaw.
Portugalio: d-ro A. M. Coimbra, Rua Colonel M. Leitão 20.1 Esq. PT-1700 Lisboa.
Rumanio: *vakas*
Rusio: *akceptita sed adreso ne komunikita.*
Sanmarino: Marina Michelotti, Contrada del Collegio 51, RSM-43031 San Marino.
Slovakio: Anton Zachariás, Sobotské námestie 6, SK-05801 Poprad.
Slovenio: Sonja Tavčar, Liminijanska 6, SI-66320 Porotoroz.
Sud-Afriko: *vakas*
Svedio: Bertil Andreasson, Södra Rörum pl. 455, SE-24294 Hörby.
Svislando: Mireille Grosjean, Rue du Temple 20., CH-2416 Les Brenets.
Venezuelo: Prof. J.E. Bachrich, Apartado 70782, Caracas 1071 A.
Zairio: Ngangu Nduantoni-Bakidila, B.P. 13, Lukala (Bas-Zaïre).

REPREZENTANTOJ

Armenio: Lida Elbakjan, Moldovakan 26/2, kv. 52, Erevan.
Aŭstralio: Max Wearing, 30 Westbury St, Hackney, SA 5069.
Bangladeŝo: Sultan Ahamad, Factory Inspection Dept., 4 D.I.T. Avenue, Dhaka-1000.
Centrafrika Respubliko: Luc Feidangai, B.P. 70, Bangui.
Ĉilio: Luis A. Vera, Isabel Riquelme 7115, Pobl. C. Estrella, La Cisterna, Santiago.
Hindio: Abani Halter, Jamboni, P.O. Bolpur 731204, W. Bengal.
Irano: Mohammad Karamudini, P.O. Box 13445-747, Teheran. Iran.
Islando: Loftur Melberg, Skolabraut 1, IS-220 Hafnarfjördur.
Jugoslavio: Radojica Petrovic, Bul. Oslobodjenja 36, YU-32000 Cacak.
Kostariko: Jorge A. Leoni de León, Apartado 7603-1000, San José.
Litovio: Algimantas Piliponis, Karolinisiu 3-93, LT-2044 Vilnius.
Niĝerio: Godwin Oboh, University of Ekpoma Wan, Illeh Box 62, Epoma Bendel.
Nov-Zelando: Gwenda Sutton, 12C Herbert Gardens, 186 The Terrace, Wellington 1.
Tanzanio: Mramba Simba, S. L. P. 1051, Bunda Mara.
Togolando: Afantchao-B.Yao,B.P.20225 Lome.
Ukrainio: Svetlana Fedotova, P.O. Kesto 88, UA-253222 Kiev.
Uzbekistano: Eugeno S. Perevertajlo, Ab. kesto 140, Taŝkent.

LABORKOMISIONOJ

Didaktikaj ludoj: Georges Sossois, rue du Basson 79, BE-6001 Marcinelle, Belgio; tel. (+32 71) 43 62 05.

Ekzamenoj: prez.: d-ro Till Dahlenburg (adreso, kovrilo 2). Sekretario de elementa kaj meza niveloj: d-ro Ivan Bekavac-Basic (adreso, kovrilo 3)

Eŭropa Komunumo kaj informado en pedagogiaj medioj: Edward Symoens, Putsesteenweg 151, BE-2920 Kalmthout (Heide), Belgio; tel. (+32 3) 666 62 66.

Gazetara servo kaj informado: *vakas sed pretas kunlabori:* Germain Pirlot, Steenbakkerstr. 21, BE-8400 Oostende; tel. (+32 59) 70 87 00 kaj Walter Klag, Rudolfinergasse 8/11, AT-1190 Wien, Aŭstrio; tel. (+43 222) 36 86 29.

Konkursoj lernejaj: Géza Kurucz, Nyíri u. 11, HU-6000 Kecskemét, Hungario.

Lerneja kontaktigo kaj statistikado: Provizore plenumata pere de *Juna amiko.*

Statuto: Rob Moerbeek kaj Oene Hoekstra, Frederikslaan 47, NL-1871 SB Schoorl, Nederlando; tel. (+31 2209) 15 65.

Terminologio: *vakas*

KUNLABORANTAJ INSTITUCIOJ

UNESKO: (rilatoj de reciproka informado, kat. C): Place Fontenoy, FR-75007 Paris. Reprezentanto de ILEI: François Lo Jacomo, 21 rue Juliette Dodu, FR-75010 Paris

UEA: Universala Esperanto-Asocio, Nwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam.

IEI: Internacia Espereanto-Instituto, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag.

KCE: Kultura Centro Esperantista, BP 779, CH-2301 La Chaux-de-Fonds.

KONTRIBUAĴOJ AL IPR

Kontribuaĵoj al IPR estu laŭeble nete tajpitaj per nigra rubando sur blanka papero kun adekvataj marĝenoj, taŭga por aŭtomata komputila enlego, aŭ surpapere prespretaj. Livero sur IBM PC-kongruaj disketoj (5,25 aŭ 3,5 colaj) bonvenas. Adreso de la redakcio sur la kovrilpaĝo, komputila retoadreso en la Postparolo. Fakaj artikoloj prefere ampleksu 3 ĝis 8 presitaj paĝoj. Pedagogiaj novaĵoj, informoj pri edukaj aranĝoj, interŝanĝaj gazetoj kaj leteroj al la redakcio bonvenaj. Ni recenzas nur ricevitajn eldonaĵojn iel rilatantaj al edukado aŭ utilaj en instruado. Regulaj redakciaj kunlaborantoj serĉataj, ekzemple por prizorgi iun rubrikon – prefere kun aliro al komputilo kaj kapablaj liveri materialon diske aŭ presprete.

MEMBRIĜO AL ILEI KAJ PAGADO POR ALIAJ SERVOJ

La membreco inkluzivas ricevon de kvar numeroj de IPR jare. Turnu vin al via landa sekcio, kiu fiksos kotizon en via propra valuto. Por pagi rekte al la internacia ILEI, skribu al la kasisto:

Kasisto de ILEI: B. Andreasson, Södra Rörum pl. 455, S-242 94 Hörby, Svedio; poŝtĝirkonto 682117-7 (Stokholmo). Membreco kostas 80 svedajn kronojn en landoj sen sekcioj kaj 100 SEK en landoj kun sekcioj (la sekcio ricevos la diferencon). Pro altaj banko-kostoj, evitu bankĉekojn kaj eĉ internaciajn poŝtoĝirojn; taŭge plenumita Euroĉeko plej bonas. Alia pagmaniero estas al UEA:

UEA, Nwe. Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, pĝk 37 89 64. UEA akceptas kredit-kartajn pagojn. Klare indiku la celon de la pago kaj la internan konton de ILEI: *ilek-a.* aŭ por *Juna amiko*: *juna-l.* Prefere informu senpere la kasiston de ILEI pri la enpago. Membreco: 20 GLD en landoj sen sekcioj, 25 GLD en landoj kun sekcioj.

Hungara ILEI-sekcio: (adreso: tria kovrilpaĝo) akceptas pagojn en hungaraj forintoj de reform-eŭropanoj por membreco kaj aliaj servoj de la Ligo.